

revuo

esperanto

aprilo 1967

60-a jaro

n-ro 737 (4)



universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

L. L. ZAMENHOF

50a datreveno

de morto

1917-1967



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 53 La zamenhofa penso kaj la hodiaŭa movado (Red.)
La lasta manuskripto de d-ro L. L. Zamenhof
- 55 Notoj kaj komentoj pri la lasta manuskripto de Zamenhof (Haupenthal)
- 56 Pliaj subskriboj por la Propono al UN
- 57 Leteroj
Forpasis Julio Baghy
- 58 Nova Esperanta filmo en hungaraj kinejoj
Filmoj en la Internacia Lingvo
- 60 Antaŭ ol vojaĝi al Israelo... (GGP)
- 61 Leteroj
- 62 Recenzoj
CED
- 63 Nekrologoj Facer, Barrett, Pratdesaba, Llorens
- 64 Ricevitaj eldonaĵoj
- 65 Mallonge
- 66 La Juna Vivo
- 67 52a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967
Citaĵoj
- 68 Esperanto en radio
- 69 Oficiala informilo n-ro 400
Gajnis loto n-ro 819
- 71 Internaciaj konkursoj
Anoncetoj

kovrila bildo

50 jarojn post la morto de Zamenhof, lia laboro plu daŭras seninterrompe (foto el la filmo "Esperanto-fonto", vidu p. 58-9)

bildojn liveris

- 58 (kaj 59) Naturamika Societo Ujpest
- 61 Israela Nacia Turisma Oficejo
- 65 La Revuo Orienta
- 66 A. Csorba
- 69 D. Waydenfeld

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu du da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

oficiala organo
de universala
esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Antaŭ 50 jaroj, la 14-an de aprilo 1917, mortis L. L. Zamenhof, iniciatinto de la Internacia Lingvo. La mondo rememoras la aŭtorojn ankaŭ de aliaj praktikaj eltrovoj, sed pli intelektu, malpli varme. Kial?

Se temas pri UEA, la ideoj kaj idealoj de Zamenhof estas retroveblaj en ĉiu el ĝiaj ĉefaj celoj kaj agadoj. Ne nur en la konkreta disvastigo de Esperanto, por kiu la metodoj kaj principoj ellaboritaj de li restas ankaŭ nun plejparte validaj, malgraŭ ke la mondo tiom ŝanĝiĝis — en 1904 Zamenhof povis skribi pri "ĉiuj landoj de la tuta mondo" kiel "30-40 landoj", hodiaŭ temas pri 130-140 — sed ankaŭ en la alia tasko de UEA: plifaciligo de ĉiuspecaj rilatoj inter la homoj, "sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo". Kiu ne trovas en tiuj vortoj eĥojn de konataj tezoj zamenhofaj? Ni citu nur kelkajn kernajn frazojn:

"Ĉiuj popoloj estas egalaj";

"La cerboj kaj la koroj de la homoj el ĉiuj gentoj estas laŭ sia naturo tute egalaj";

"Ĉiu regnano havas plenan rajton uzi tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas";

"Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj".

Jam longe antaŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, tiaj principoj profunde influis la tutan Esperanto-movadon.

Zamenhof skribis: "Mi ne volas esti kreinto de l' lingvo, mi volas nur esti iniciatoro". Sed ne sufiĉis iniciati — kaj jen plenumita afero. Se jes, li eble estus jam forgesita. Necesis granda, sinofera laborkapablo; necesis plena kompreno pri la homaj reagoj kaj la funkciado de la publika opinio; necesis senfinaj toleremo kaj malegoismo en la homaj rilatoj. Ĉar se Zamenhof ne havus tian humilan, sed samtempe prudente antaŭvideman karakteron, kiu scias, ĉu hodiaŭ vivus entute la Lingvo Internacia.

Tial ni memoras lin.

Ĉi-sube ni publikigas por la unua fojo la plenan, fidindan tekston de lia lasta manuskripto. En ĝi ankoraŭfoje speguliĝas la personaj kvalitoj ĵus menciitaj. Nelonge post tiu skribo, Zamenhof mortis. Sed jam tiam li povus diri, kiel Horatius:

Ol bronz' pli daŭre staras jam mia monumento,

Supera laŭ la alto al pinto piramida,

Ĝin nek mordemaj pluvoj, nek akra norda vento

Nek jaroj nenombreblaj, jarcento post jarcento,

Detruos jam: ĝi spitos al tempo-pas' rapida.

LA LASTA MANUSKRIPTO DE D-RO L. L. ZAMENHOF

Pri Dio kaj pri senmorteco (1)

Oni scias, ke multaj personoj, kiuj dum sia tuta vivo tute ne interesis sin pri "Dio" nek pri "animo" (2), aŭ kiuj eĉ konstante kun mokado negadis la ekzistadon de ambaŭ, en la lastaj jaroj antaŭ sia morto fariĝas "kredantoj", aŭ ili almenaŭ ĉesas esti absolutaj "negantoj". Oni scias, ke eĉ inter la grandaj, menspotencaj filozofoj troviĝis tiaj, kiuj dum sia tuta vivo estis ateistoj kaj tamen en siaj lastaj jaroj fariĝis se ne "piaj kristanoj", tamen almenaŭ "deistoj", mistikuloj spiritistoj aŭ tiel plu. La ateistoj klarigas tion tute simple aŭ per nesincereco, aŭ per maljunula malsaniĝo (3) de la cerbo, aŭ per la (4) fakto, ke, starante antaŭ la rando de sia tombo, antaŭ sia plena, porĉiama neniĝo, kaj vidante (5) antaŭ si plu nenian esperon, la homo penas konsoli sin per memtrompo, li penas alkroĉiĝi al iluziaj bildoj, kiujn li mem al si kreis.

Ĉu tia klarigo estas ĝusta aŭ ne, — mi ne scias. Tre povas esti, ke por apartaj kazoj (?) (6) tia klarigo estas tute ĝusta; apliki ĝin tamen al ĉiuj (7) kazoj, ŝajnas al mi afero tro memfida. Ĉu tio ne estas arogantaĵo de nia flanko, se ĉion, kio estas konforma al nia opinio, ni nomas normala, kaj ĉion, kio estas kontraŭ nia opinio, ni nomas malnormala, malsaneca? Ĉu ni ne povas — se ne por ĉiuj okazoj, tiam almenaŭ por parto da ili — akcepti la eblecon, ke homo ŝanĝis sian opinion pro tio, ke li eksentis, ke li ĝis nun *eraris*?

Sed ni lasu tiun demandon, ĉar ĝi (8) ne estas grava por ni, des pli, ke pro la obstineco de la homa karaktero, la nombro de la homoj, kiuj en la maljuneco efektive sincere ŝanĝas sian mondrigardon kaj estas sufiĉe (9) honestaj kaj kuraĝaj por malkaŝe tion konfesi, — estas ne

¹ unua teksto: Pri senmorteco kaj pri Dio

² unua teksto: "animo" nek pri "Dio", en sia malj

³ unua teksto: malfortiĝo

⁴ unua teksto: per tiu fakto

⁵ "kaj vidante" staris unue post "tombo", sed

estis trastremita

⁶ "(?)" jam en la originalo

⁷ kursivaj vortoj estas substrekitaj de Zamenhof

⁸ sekvas p. 2 de la manuskripto

⁹ unua teksto: tiom

tre granda. Mi ektuŝis tiun demandon nur pro tio, ke mi antaŭvidas, ke ankaŭ al mi oni eble volos apliki la supre priparolitan ⁽¹⁰⁾ klarigon. "Ĝis nun", oni diros, "li neniam parolis pri Dio nek pri senmorteco; ⁽¹¹⁾ li ne pasigis sian vivon en medio de kredantoj, li sekve al kutimiĝis al pensado libera; li estas kuracisto, kaj sekve jam la sciencoj, kiujn li studis, devis ""klare montri al li, ke Dio kaj senmorteco ne ekzistas""; do, se li nun volas paroli pri la ekzistado de Dio kaj de ⁽¹²⁾ senmorteco, li estas aŭ nesincera, aŭ pro maljuneco kaj malsaneco lia mensa kaj psika ⁽¹³⁾ stato ne estas normala."

Ne, sinjoroj! Se en kelkaj apartaj kazoj via klarigo eble estas aplikebla, ĉe mi ĝi absolute ne povas esti aplikata. Por esti malsincera kaj por hipokrite ŝajnigi, ke mi kredas je Dio kaj je senmorteco, - mi havas absolute nenian kaŭzon nek celon, kaj, kiom ajn multe vi serĉos, vi neniel trovos eĉ plej malgrandan motivon, kiu povus inklinigi min malsincere ŝajnigi kredadon. Mi havas ĉirkaŭ mi neniun, al kiu mi povus plaĉi per mia "kredado"; kontraŭe, por mia tuta ĉirkaŭantaro mi fariĝos nur ridindulo aŭ almenaŭ malagrabla strangulo, kaj, fininte la verkadon de ĉi tiu artikolo, mi ⁽¹⁴⁾ - por eviti malharmonion - verŝajne denove por ĉiam ĉesos paroli pri la malagrablaj kontraŭmodaj temoj. Kaj dum en la mondo scienca kaj liberpensa mi perdos ĉian estimon, mi samtempe en la mondo de kredantoj trovos nenian kompensan simpatian, sed verŝajne nur atakon, ⁽¹⁵⁾ ĉar mia kredo estas tute alispeca ol ilia kredo! ⁽¹⁶⁾

Se oni ne povos klarigi mian agadon per malsincereco, oni do eble volos ĝin klarigi per maljunula kaj eble antaŭmorta stato de mia menso. Sed ankaŭ tio estus eraro ⁽¹⁷⁾. Mi devas atentigi la legantojn, ke ĉio, kion mi nun skribas, la tuta temo kun ĉiuj ĝiaj pensoj kaj argumentoj, naskiĝis en mia kapo ne nun, sed antaŭ 40 jaroj, kiam mi havis la aĝon de 16-18 jaroj; malgraŭ ke mi de tiu tempo multe meditis kaj legis diversajn sciencajn kaj filozofiajn verkojn, miaj tiamaj ideoj pri Dio kaj pri senmorteco preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis.

☆

Oni pardonu al mi, ke mi kuraĝas prezenti miajn ideojn pri la du plej gravaj filozofiaj problemoj, kvankam mi neniam ilin speciale studis. Mi ofte meditis pri ili, sed mi neniam havis sufiĉe da pacienco por sisteme esplori ĉion, kion oni ĝis nun skribis pri ili. ⁽¹⁸⁾ Mi ne estas filozofo-specialisto, mi estas nur *diletanto*.

Do mi tute ne pretendas, ke mi donos al la legantoj ian grandan novan instruon ⁽¹⁹⁾, ian novan eltrovon, pri kiu ⁽²⁰⁾ la mondo ankoraŭ nenion sciis, iajn geniajn pensojn, kiuj al neniuj ankoraŭ venis en la kapon. Tre povas esti, ke tio, pri kio mi parolos, estas jam delonge konata al ĉiuj; tre povas esti, ke miaj vortoj estas tute senenhavaj kaj miaj argumentoj havas nenian pruvan valoron; tre povas esti, ke miajn konkludojn la kompetentaj specialistoj trovos tute naivaj kaj eraraj. Sed la temoj, kiujn mi volas pritrakti, estas tiel eksterordinare gravaj, ke pli bone estas babilu pri ili mil senvaloraĵojn, ol kaŝi unu penseron, kiu povas doni ian novan radieton de lumo. Se en mia artikolo troviĝas unu tia nova grajneto da vero, aŭ se mia diletanta [artikolo] ⁽²¹⁾ ekinteresos kaj ⁽²²⁾ instigos al memstara kaj eble fruktodona meditado tiajn personojn, kiujn fortimigus la dikaj kaj ofte malbone digesteblaj libroj de filozofoj-specialistoj, — la celo de mia artikolo estos tute atingita.

☆

Mia patrino estis religia kredantino, mia patro estis ateisto ⁽²³⁾. En mia infaneco mi kredis je Dio kaj je senmorteco de la animo en tiu formo, en kiu instruis mia denaskiĝa religio. Mi ne memoras tute precize en kiu jaro de mia vivo mi perdis la religian kredon; sed mi memoras, ke la plej altan gradon de mia nekredado mi atingis ĉirkaŭ la aĝo de 15-16 jaroj. Tio estis ankaŭ la plej turmenta tempo de mia vivo. La tuta vivo perdis en miaj okuloj ĉian sencon kaj valoron. Kun malestimo mi rigardadis min mem kaj la aliajn homojn, vidante en mi kaj en ili nur sensencan pecon da viando, kiu ⁽²⁴⁾ kreĝis oni ne scias pro kio kaj oni ne scias por kio, kiu travivos en la eterneco malpli ol plej malgrandan sekundeton, baldaŭ forputros por ĉiam, kaj dum ĉiuj venontaj senfinaj milionoj kaj miliardoj da jaroj ĝi jam neniam plu reaperos. Por kio mi vivas, por kio mi lernas, por kio mi laboras, por kio mi amas? Ĉio estas ja tiel sensenca, senvalora, sencela, tiel ridinda!

⁽²⁵⁾ Mi eksentis ke eble ne malapero, eble la morto estas miraklo, ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ke io nin gvidas al ia celo...

Ĉiuj verŝajne obtuze kredas, ĉar alie ilia vivo estus kiel vivo de besto

¹⁰ unua teksto: montritan

¹¹ trastrekitaj: "li estas ne teologo, ne (unue: neniam) vivis en me"

¹² unua teksto: pri

¹³ unua teksto: psiĥa

¹⁴ trastrekitaj: denov

¹⁵ trastrekitaj: sed nur mal (verŝajne fariĝintus: malsimpatio)

¹⁶ sekvas p. 3 de la manuskripto

¹⁷ unua teksto: absoluta eraro

¹⁸ Tiu frazo staras sur la dekstra margeno.

¹⁹ unua teksto: eltrovon

²⁰ unua teksto: pri kiuj

²¹ jam en la originalo en angulaj krampoj

²² sekvas p. 4 de la manuskripto

²³ unua teksto: liberpensulo

²⁴ trastrekitaj: ekzistas tute

²⁵ La lastaj frazoj skribitaj laŭ la dekstra margeno

Al la supra artikolo de Zamenhof estas aldonita kvina folio, en kiu li skizas la enhavon de sia artikolo. Jen ĝia teksto:

Plano de la artikolo "Pri Dio kaj pri senmorteco"

Oni pensos ke fariĝis kredanto ĉar mi estas antaŭ morto. Ne: a) mia kredo ne estas tia; b) la tuta nuna kredo kaj argumentado jam estis ĉe mi 16-18 aĝa. Senkredeco en la 5a klaso. Trankviliĝo kaj eklaboro de ... De tiam preskaŭ nenio en mia menso ŝanĝiĝis, kvankam mi legis multajn verkojn Sekve vi povas diri, ke mi simple estas masaĝa ⁽²⁶⁾, sed vi ne povas ... Pri tio ĉiu juĝu laŭ sia ... En la nuna tempo estus multe pli prudente se mi silentus tamen ne volas ne povas Oni pardonu mian nekapablecon Mi ne pretendas doni ion gravan, novan k t. p. Eble senenhava, sensenca oni juĝu kaj korektu ... Mia

celo estas nur montri iel kial mi kredas pri Dio, pri senmorteco; ke oni ne miru ⁽²⁷⁾

Sur la unua paĝo de la manuskripto, super la titolo, estas faritaj jenaj notoj:

Komenco:

- 1 Kredo ne homarana, sed *mia*;
- 2 Mi ne ligas min, mi esprimas nur miajn supozojn kaj oni ne miru, se ...
- 3) Preparojn dum tuta vivo, sed ... nun oni ne miru pececon, senenhavecon ...

Kaj en la supra dekstra angulo de la unua folio troviĝas la vortoj:

(Enhavo vidu paĝo 4)

Ili rilatas la ĉi-supre donitan planon, kiu tamen troviĝas nun sur kvina folio.

²⁶ tiel en la originalo; legu: masaĝa


²⁷ Ĉi tie finiĝas la skribo

la lasta manuskripto
de d-ro zamenhof

NOTOJ KAJ KOMENTOJ PRI LA LASTA MANUSKRIPTO DE ZAMENHOF

1. Historio de la teksto

1.1. **Ekesto:** La supre donita teksto estas la supozeble plej lasta manuskripto de Zamenhof, verkita plej verŝajne en Aprilo 1917. Ĝi estas manskribita, laŭ supozo de Waringhien kraĵone



skribita (La kraĵonecon jam diris Privat.) La skribo estas rapida kaj trema, sed, escepte de kelkaj lokoj, tamen bone deĉifrebla. Ĝi tre similas tiun de letero al Marie Hankel de 8 APR 17 (kp. OV 569; parta faksimilo en OV 604).

1.2. **Publico:** Fragmentoj de la teksto estis unuafoje publicitaj en "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat ⁽¹⁾. Tamen Privat faras multajn mislegojn kaj ellasojn. Tiun tekston Dietterle represos en sia OV 358. Sed eĉ li pli malbonigas la tekston de Privat en iuj lokoj, tiel ke OV plu ne estas fidinda.

Mallonge antaŭ sia morto (22 AŬG 62) Privat publicis preskaŭ la tutan tekston en "La Praktiko" ⁽²⁾. En la sama n-ro li rakontas, ke mallonge post la morto de Zamenhof li ricevis de ties vidvino plurajn manuskriptojn (i.a. verŝajne tiujn, kiujn li fragmente publicis en sia Vivo), kiujn li nun (1962) volas donaci al publikaj muzeoj. Efektive IEMW ricevis en 1963 de la vidvino de Privat fotokopion de la manuskripto ⁽³⁾. (Al IEMW ankaŭ mi dankas mian fotokopion.) Restas tamen neklare, kie hodiaŭ kuŝas la originalo.

Unuafoje ni do nun prezentas la tekston en korekta lego. Ni plene respektis la skribon de Zamenhof ĝis la interpunkciaj detaloj. Estas mia agrabla devo sur tiu ĉi loko kore danki al Prof. Waringhien, kiu valore helpis min en la deĉifro de la teksto, kaj al D-ro Albault, kiu kontrolis la komentojn.

(daŭrigo sur sekvanta paĝo)

¹ Edmond Privat: Vivo de Zamenhof, London 1920, p. 198-200; 4a eld., Rickmansworth 1957, p. 129-31.

² La Praktiko 25 (1961) 172-74.

³ Informilo de Internacia Esperanto-Muzeo Wien 14 (1963) n-ro 4 (52), p. 13.

esperanto
aprilo 1967

Kvankam ankoraŭ nur nemultaj membroj respondis al la alvokoj, daŭrigi la kolektadon de subskriboj por la Propono prezentita al Unuiĝintaj Nacioj, la Centra Oficejo en Rotterdam dissendis denove kelkajn centojn da folioj al petantoj dum la pasinta monato. Alvenis ankaŭ nombro da plenigitaj folioj, tiel ke la sumo de individuaj subskriboj nun atingis 925 757. La C.O. de tempo al tempo transsendas al la Sekretariato de UN en Nov-Jorko ĝisdatigitan statistikon de la subskribintoj.

Sekvas listo de la antaŭe ne menciitaj gravaj organizaĵoj, kiuj subskribis la Proponon:

Socialista Partio (Sozialistische Partei), Wien, Aŭstrujo. 700 000 membroj.

Nov-Zelanda Labor-Partio (New Zealand Labour Party), Wellington, Nov-Zelando. 200 000 mem.

Sindikato de Komunumaj Oficistoj (Gewerkschaft der Gemeindebediensteten), Wien, Aŭstrujo. 120 000 mem.

Sindikata Organizaĵo de Departemento Cson-

grád, Hungarujo. 113 342 mem.

Sindikata Organizaĵo de Departemento Bács-Kiskun, Hungarujo. 97 000 mem.

Landa Organizaĵo de Sindikatoj en Norvegujo (Landsorganisasjonen i Norge), Oslo. 576 000.

Sindikato de Fervojaj Laborantoj (Związek Zawodowy Pracowników Kolejowych P.R.L.), Varsovio. 491 211 mem.

Asocio de la Pola Instruistaro (Związek Nauczycielstwa Polskiego), Varsovio. 432 000.

Profesia Unuiĝo de Verkistoj de Kulturo kaj Arto (Związek Zawodowy Pracowników Kultury i Sztuki), Varsovio. 76 251 mem.

Pola Ruĝa Kruco (Polski Czerwony Krzyż), Varsovio. 4 500 000 mem.

Laborista Federacio de Junularaj Organizaĵoj de la Meksika Respubliko (Federación Obrera de Organizaciones Juveniles de la República Mexicana), México. 200 000 mem.

Unuiĝo de Polaj Studentoj (Zrzeszenie Studentów Polskich), Varsovio. 240 000 mem.

Pola Skolta Asocio (Związek Harcerstwa Polskiego), Varsovio. 1 646 700 mem.

la lasta manuskripto de Zamenhof (daŭrigo)

2. Enhavo

Por ne tro longigi la artikolon ni ĉi tie ne povas larĝe interpreti la tekston. Efektive, kiel li diras, Zamenhof malofte tuŝis religiajn demandojn, krom se oni volus kiel tiajn rigardi liajn elpaŝojn pri homaranismo. Tamen li plurfoje konfesis sin hebreo ⁽⁴⁾. Kiel tia li en sia juneco aktive partoprenis la cionisman movadon. Per sia homaranismo li volis, same kiel per la neŭtrala lingvo, nur krei ponton inter la popoloj. Oni hodiaŭ scias, ke ambaŭ agojn — la kreon de lingva kaj de religia ponto — larĝe inspiris la bjelostokaj kvereloj. Privat donas en sia nomita libro pliajn ekzemplojn por la religia sinteno. Krome mi referencas al kelkaj bonaj artikoloj pri la temo. ⁽⁵⁾

3. Lingvaj notoj

3.1. Neologismoj: Ke la vorttrezoro de Zamenhof kun ĉiu lia nova verko kreskis, estas ĝenerale konate. Aldoniĝis laste, okaze de la eldono de Fab IV, ekz. la vorto "ŝlifi", ĝise eĉ ne uzita.

3.1.1. neg: La nuna artikolo donas zamenhofecon al la radiko "neg" (uzita dufoje: "negadis", "negantoj"). Tiu radiko eĉ ne troviĝas en PV kaj PVS.

3.1.2. deist: "Deism" estas zamenhofa (kp. Wüster: Zamenhof-Radikaro /ZR/ kaj Enciklopedia Vortaro /EV/). En EV Wüster donas kiel apartan radikon "deist", sed ankoraŭ sen zamenhofeco. Cetere, ambaŭ radikoj ankoraŭ ne estas oficialigitaj.

3.1.3. psik: Ĝi jam aperis en la germanaj vortaroj de Zamenhof. Interese, ke li unue ĉi tie

skribas "psiĥa". Ĉu tio estas rememoro pri la vortara formo aŭ inklino anstataŭigi la literon ĥ? Ĉiukaze la formo "psiĥ" abortiĝis en la plumo de Zamenhof.

3.1.4. diletant: Laŭ EV la radiko estas dilet (tiel en la rusa vortaro de Zamenhof!). La vorto estas oficialigita en la 3a OA.

3.2. Aliaj rimarkoj:

interesis sin: hodiaŭ pli ofte: interesiĝis. (Kp. Lingvo kaj Vivo, p. 267/68 pri troviĝi: sin trovi.)
mentrompa: hodiaŭ: sintrompa. (Kp. sinmortigo, sindono).

denaskiĝa religio: hodiaŭ: denaska religio.

viando: Ĝi estas la plej interesa vorto, ĉar la donita al ĝi signifo (=karno!) estas reveno al arĥaismo. En Hamleto ⁽⁶⁾ 173/121 kaj 187/101-2 "viando" troviĝas samasence. Kaj ankoraŭ en la germanaj vortaroj sub "Wade" aperas ambaŭ formoj: tibikarno kaj tibiviando (hodiaŭ: suro).

Reinhard Haupenthal

⁴ Ekz. LZI, 92; LZ I, 205.

⁵ Krom OV kaj LZ:

A. Caubel: Nekonata: La Zamenhofa Homaranismo, en: Sennacieca Revuo, N-ro 87, 1959.
C. v. Kleef: La homaranismo de D-ro L. L. Zamenhof, Marmande 1965.

N.Z. Maimon: La cionista periodo en la vivo de Zamenhof, en: NLR 3 (1958) 126-37, 165-77.

N.Z. Maimon: Historio de Hilelismo, en: NLR 5 (1960) 136-40, 163-71.

G. Waringhien: La ideologia dramo en L. L. Zamenhof, en: Sennacieca Revuo, N-ro 81, 1953.

⁶ Hamleto. Reĝido de Danujo, 8a eld., Marmande 1964.

Jen kelkaj notoj pri la artikolo de s-ro Beaucaire (feb. 1967, p. 23).

1. La regulo ne bezonas aldonon, kaj ĝi plene pravigas la kutiman uzon de la akuzativo. *Mi iras trans la kampon* tute ne estas "falsa" ekzemplo pri direkto. Ja *la kampo* ne estas la celo de mia irado, sed *trans la kampo* estas ĝi, tial al *trans la kampo* oni aldonas la finiĝon de la akuzativo. Tute same, kompreneble, pri *Mi iras ekster la urbon*.

2. Do, laŭ la sama regulo, la akuzativon oni ne uzas, se oni ne intencas "montri direkton":

a) *Mi iras al Parizo*. Direktiĝon al *al Parizo* oni maloftege bezonas esprimi. Direktiĝon al *Parizo* la vorto *al* jam montris, kiam oni alvenas la lokon de eventuala akuzativo.

b) *La kuglo flugas tra la muro*. Kompreneble ĝi ne restas en ĝi, "sen lokŝanĝo". Sed ne *tra la muro* estas ĝia celo. Pro tio mi emas malaprobi *Mi iras tra la urbon* (almenaŭ kun la

signifo, kiun donas al ĝi s-ro Beaucaire; ĝi eble povus signifi, kontraŭe, ke mi ne ankoraŭ estas trairanta la urbon, sed mi direktiĝas al tio: certe maloftaĵo).

c) *Saltego trans jarmiloj*. Ĉi tie gravas ne malproksima tempo (trans jarmiloj), al kiu oni alvenas (-n), sed la transsaltado mem de multaj jarmiloj. Nek direkton nek eĉ "lokŝanĝon" Jean Forge esprimis. *Trans limo sen pago*: Simile, ne temas pri iro en la landon transliman, sed pri la translimiĝo mem.

ĉ) *Trempe* ne ricevas precize la saman signifon, se oni uzas ĝin kun la almovia akuzativo (tiam ĝi montras la movon en la likvaĵon), kaj sen (tiam ĝi montras la banon de la koncerna objekto en la likvaĵo).

3. Kiel montriĝas per la lastaj ekzemploj, oni foje povas uzi, aŭ ne, la akuzativon, sed per tio oni aliigas la signifon de la frazo.

Francisko Simonnet
Parizo, 20 feb 67

INFORMI, SED ANKAŬ INSTRUI

Kun tre granda intereso mi legis kaj relegis la artikolon de d-ro A. Albault, aperintan sur p. 18 de la februara "Esperanto", rilate la disvastigon de Esperanto.

La ideon de d-ro Albault mi trovas plej laŭdinda, sed mi krome konsideras, ke ĉiuj devas iom pli fari, ol nur altiri atenton al la lingvo. Se ni havas amikon aŭ konaton, ni devas lin aŭ ŝin instrui, ĉar ne ĉiuj entuziasmiĝas por studi solaj. Tial venis al mi la ideo, ke UEA 1) elektu iun bonan metodon por lerni Esperanton, kiun oni facile povus adapti por preso en formo de apartaj lecionoj, ne kiel libro;

2) eldonu aliajn foliojn kun simplaj instrukcioj por esperantistoj, per kiuj ili, eĉ ne estante instruistoj, povos helpi lernanton almenaŭ dum la unuaj monatoj;

3) iniciatu kampanjon, por ke ĉiuj membroj "adoptu" iun kaj instru al li la lingvon.

Víctor Luis Cao
Kobe, Japanujo, 12 feb 67

Kampanjo por instruado al "amikoj kaj konatoj" povus esti danĝera, ĉar jam sen tio ofte okazas, ke entuziasmoj trudas la lingvon al amikoj aŭ konatoj, kiuj mem ne sufiĉe interesiĝas kaj kiuj baldaŭ pro tio fariĝas eks-amikoj kaj eks-konatoj. Aliflanke certe ekzistas bezono de instrumaterialoj por tiuj, kiuj ne havas sperton aŭ apartan talenton kiel instruistoj. Ni atentigu, ke UEA jam eldonis la nuntempe plej sukcesan internacian lernolibron, "Privilegia vojo", kiu taŭgas ne nur por memlernado sed ankaŭ por tiaspeca, duone-gvidata lernado. UEA ankaŭ eldonis multobligitajn materialojn por korespondakurso ligita al "Privilegia vojo", kun instrukcia folio por sensperta kursgvidanto. (Prezo:

0,50 gld. ĉe la Libroservo de UEA). La materialoj estus facile uzeblaj ankaŭ por buŝa instruado. — Red.

ŜLOSILOJ BEZONATAJ

Pri la artikolo "AIDA?" de d-ro Albault mi konsentas. Mi spertis, ke la Ŝlosiloj estas tre utilaj, sed nuntempe ne multaj estas aĉeteblaj. Kial?

En 1950 mi vizitis Italujon, kaj iu italo demandis min pri la Esperanta stelo — per gestoj, ĉar mi ne parolas itale, kaj li ne parolis la anglan. Poste mi pripensis: "Se mi havus italan Ŝlosilon, mi povus prezenti Esperanton al li." Do, kiam mi hejmeniris, mi provis aĉeti, sed ĝi ne estis aĉetebla.

En 1960, kiam mi vizitis la Universalan Kongreson en Bruselo, mi supozis, ke mi povos aĉeti la francan Ŝlosilon (ĉar la flandran mi jam havis), sed ne. Ĉi-maje mi vizitos Grekujon, sed mi ne povos kunporti grekan Ŝlosilon.

Ivy Myers
Poole, Britujo, 11 feb 67

En 1965 la Societo de Internaciaj Plumamiko-
joj (Tokio) proponis proprakoste reeldoni elĉerpitajn Ŝlosilojn kaj prepari novajn. Tiun proponon la Komitato de UEA rekomendis. Pri la nuna stato de tiu projekto ni tamen ne povis ricevi informojn. — Red.

FORPASIS JULIO BAGHY

Kun malĝojo ni komunikas, ke la 18-an de aprilo mortis Julio Baghy, verkisto, akademiano, honora membro, komitatano de UEA. Nekrologo aperos en la maja "Esperanto".

esperanto
aprilo 1967



NOVA ESPERANTA FILMO

En 1926-8 hungaraj natur-amikoj konstruis apud Budapeŝt en la montaro Pilis fonton; ili donis al ĝi la nomon "Esperanto-fonto". La nomo tamen al la tiama registaro ŝajnis kontraŭ-nacia, kaj oni ruinigis la konstruaĵon. Nur en la printempo de 1966 la iamaj konstruantoj, pensante pri la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝt, decidis restarigi la fonton. En sia laboro ili ricevis neatenditan helpon de grupo da gejunuloj, kiuj nenifare vagabondis en la montaro. Gajnite de la simpatia sinteno de la maljunaj natur-amikoj, la gejunuloj partoprenis ilian laboron kaj fine ankaŭ lernis de ili Esperanton. Kulmino venis en la somero, kiam ili jam sukcesis interkompreniĝi kun eksterlandaj gejunuloj, partopre-

FILMOJ EN LIN

Kinematografio ne estas la plej vaste plugita kampo de aplikado de Esperanto. Kaj informoj pri la ekzistantaj filmoj en Esperanto ne estas facile troveblaj. Tial, kun helpo de la gvidanto de la Filma Servo de UEA, ni kompilis provizoran liston, kiu povas esti utila al organizantoj de filmvesperoj kaj interesa ankaŭ por aliaj.

Antaŭe, tamen, necesas iom laŭta averto: la akirado kaj montrado de filmoj estas afero plena de obstakloj, jen gravaj, jen malpli, depende de la lando. Antaŭ ol definitive mendi iun filmon, nepre esploru ĉe la dogano aŭ aliaj oficialaj instancoj, ĉu la importo kaj re-eksporto estas ebla, kaj sub kiuj kondiĉoj. Kalkulu, ke la transporto kaj dogana kontrolo de filmoj povas daŭri neordinare longe. Tial estas preferinde, eĉ ne anonci la montradon de la filmo, antaŭ ol ĝi alvenis sekure.

La Filma Servo de UEA (s-ro Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Västra Frölunda, Svedujo) disponas pri ekzempleroj de iuj el la filmoj kaj povas ludoni ilin kontraŭ pago de transportaj kaj administraj kostoj.

ANGOROJ (1964). Originala krimfilmo nigra-blanka. 16 mm. 60 min. Optika sono. Informas UFE, 34 rue de Chabrol, F-75-Paris (10e). Recenzo: 1964 p. 134.

AŬSTRALIO HODIAŬ. Kolora. 16 mm. 30 min. Optika sono. Informas: aŭstraliaj ambasadoj.

BONVENON AL OSLO (antaŭ 1962). Kolora 16 mm. 15 min. Optika sono. Informas: NEL, Boks 942, Oslo 1, Norvegujo.

BRILA FESTOTAGO (1965). Pri la 15-a datreveno de Ĉina Popola Respubliko. Kolora. 60 min. Informas: ambasadoj de ĈPR.

ESPERANTO-FONTO (1966). Gejunuloj direktiĝas al konstrua laboro kaj internacia amikeco per Esperanto. Nigra-blanka. 35 kaj 16 mm. 17 min. Informas: Hungarofilm, Budapeŝt, V. Báthory u. 10, Hungarujo.

EŬROPA RAPSODIO. Reklamo de Philips. Nigra-blanka. 16 mm. 30 min. Optika sono.



EN HUNGARAJ KINEJOJ

nantoj de la Universala Kongreso.

Tiun ĉi simplan, sed pozitivan historion rakontas nova nigra-blanka dokumenta filmo ĵus eldonita de la Hungara Filmprodukta Entrepreno. Al la preparo de la filmo kontribuis Naturamika Societo Ujpest kaj Hungara Esperanto-Asocio. En ĝi aperas, kompreneble, ankaŭ diversaj partoprenintoj de la 51-a U.K. en Budapeŝt.

La dialogo de la filmo estas jen hungara, jen Esperanta, laŭ la evoluo de la historio; sed ĉiuj hungaraj paroloj ricevis klarigajn Esperantajn sub-titolojn. Normalformata (35-milimetra) eldono de la 17-minuta filmo nun cirkulas en hungaraj kinejoj. En preparo estas ankaŭ 16-mm-a eldono.



TERNACIA LINGVO

Informas: Filma Servo de UEA.

FIAT-AŬTOMOBILLOJ. Kolora. 8 mm. 40 min. Magneta sono. Informas: Filma Servo de UEA.

FIAT 850 (1965). Pri la samnoma aŭto. Kolora. 8, 16 kaj 35 mm. Informas: FIAT, Direzione Stampa e Propaganda, Corso Marconi 10, Torino, Italujo.

GOTENBURGO. Pri la sveda urbo. Kolora. 16 mm. 20 min. Magneta sono. Informas: Filma Servo de UEA.

GERMOJ DE LUMO (1962). Reklamo de Gevaert. Kolora. 16 kaj 35 mm. 25 min. Optika sono. Informas: N.V. Gevaert Foto-Produkten, Dienst Publiciteit, Septestraat, Mortsel, Belgujo. Priskribo: 1962, p. 52.

INCUBUS (1966). Usona drama filmo pri demonoj. Produktis: Daystar-Contempo III, Paramount Pictures Corporation. Recenzo: 1967, p. 25. Dialogo preskaŭ nekomprenebla.

LA NOV-ZELANDANOJ (1964). Kolora. 16 mm. 10 min. Informas: Filma Servo de UEA.

NOV-ZELANDO. Nigra-blanka kaj kolora. 16 mm. 15 min. Optika sono. Informas: Filma Servo de UEA.

OOMOTO-FESTIVALO (1965). Pri la Esperanta internacia festivalo en Kameoka, 1965. 30 min. Informas: Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

ORFEA JETMOTORO. Teknika dokumenta filmo. Kolora. 16 mm. 20 min. Magneta sono. Informas: Films Dept., Bristol Siddeley Engines Ltd, P.O. Box 3, Bristol, Britujo.

RENKONTO KUN FIAT (1966). Reklamo de FIAT. Kolora. 8 aŭ 16 mm. Informas: FIAT, Direzione Stampa e Propaganda, Corso Marconi 10, Torino, Italujo.

SPUROJ DE LA HISTORIO (1958?). Pri la urbo Mainz, Germanujo. Nigra-blanka. 16 mm. 20 min. Optika sono. Informas: Filma Servo de UEA.

48-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, SOFIO (1963). Dokumenta filmo. Informas: BEA, Poŝtkesto 66, Bulvardo Ĥr. Botev 97, Sofia, Bulgarujo.



ANTAŬ OL VOJAĜI AL ISRAELO...

Ni estas certaj, ke vi planis aŭ estas finplananta ĉion kaj ke vi jam digestis ĉiujn informojn, kiujn povis doni al vi via vojaĝagentejo aŭ la Israela Ŝtata Turisma Oficejo en via lando (Israelo estas la lando de lakto kaj mielo, kaj la elektro estas 220-volta). Ĝuste por konfuzi vin iom pli, ni kolektis kelkajn kromajn informojn por vi:

Nu, ni vidu: Kian ajn restadon vi havos ĉi tie, ĝi kostos al vi monon. Israelaj pundoj estas la valuto de la lando, tiel ke vi devas fari certan provizon da ili antaŭ via foriro. La Israela Pundo (₪) konsistas el 100 agoroj (hebree 'agorot', t.e. la pluralo de 'agora'). Sed, por iom pli konfuzi, la malnovaj 'pruta'-moneroj ankoraŭ estas uzataj. Tio devenas el la tempo, kiam la Israela Pundo estis dividita en 1000 prutojn. Dek prutoj egalas nuntempe al unu agoro. Ekzistas nun moneroj de 1, 5, 10 kaj 25 agoroj. Krome ekzistas papermono de 1, 5, 10 kaj 50 pundoj.

Ĉar vi estas serioza persono, sendube vi interesiĝas pri viaj manĝoj en Israelo. Ekster la manĝoj, kiujn vi povas ricevi en ĉiu normala hotelo, ni sugestas al vi klopodi konatiĝi kun kelkaj orientaj manĝoj kiel: ŝaŝliko, kebabo, humuso, tehino, falafelo, sunijo. El kio ili konsistas, estas nun malfacile klarigi, sed ili estas ĉiukaze bongustaj.

Se vi deziras iri, ni diru, al Strato Abraham Lincoln, vi povas haltigi la unuan personon, kiun vi vidas, kaj demandi "Ejfo (kie) rehov (strato) Abraham Lincoln?". Nun la problemo estas: kompreni la respondon. Nia sola sugesto estas, ke vi lasu en la hotelo vian libron de "Elementoj de la Hebrea Lingvo" kaj klopodu fari vian demandon en unu el la lingvoj, kiujn vi konas. Estas multe da ŝancoj, ke tiu persono ne nur respondos en la sama lingvo sed ankaŭ invitos vin hejmen por konatiĝo kun la tuta familio kaj por taso da kafo.


Ni firme avertas vin kontraŭ la klopodo entrepreni la lernadon de la lingvo dum via restado, se vi ne intencas resti en la lando sufiĉe longan tempon. Sed vi povas tamen lerni, ke 'todah' signifas dankon; 'sliĥa' signifas pardonon; 'bevakaŝa' signifas bonvolu kaj 'kama' signifas kiom. Krome 'kaffeh' signifas kafon; 'tej' signifas teon; 'kolnoa' signifas kinejon; 'taksi' signifas taksion, kaj 'idiot' — tre malnova Talmuda vorto — signifas idioton.

Jen kelkaj NEoficialaj sugestoj por via amuziĝo, kiuj povas allogi vin:

Vi povas, ekzemple, promeni tra la bazaro Karmel de Tel Aviv, la plej granda surstrata bazaro en la lando. Vi povas sidi en la Kafejo Cassit en Strato Dizengoff, Tel Aviv, la plej

S-ro Józef Murĵan (aŭtoro de la nova vortaro hebrea-Esperanta) gvidas Cseh-metodan kurson dufoje semajne por oficistoj de la turisma entrepreno Peltours en Tel Aviv, oficiale nomita por organizi la ekskursojn, loĝadon k.s. por partoprenantoj de la 52-a U.K.





ŝatata renkontejo de artistoj kaj verkistoj. "La lasta ŝanco" estas nokta klubo en Beer-Ŝeba, kie valoras perdi kelkajn horojn de via dormo, kaj en Elat estas fiŝista restoracio nomata "La fino de la mondo".

Faru vojaĝeton per aŭtobuso. Ĝi eble ne estas la plej komforta maniero de transporto, sed certe unu el la plej interesaj. Se vi vojaĝos, ekzemple, de Tel Aviv al Beer-Ŝeba per regula interurba aŭtobuso, viaj piedoj estos surpaŝitaj de juna kulturisto el kibuco en Negeb, soldatoj, enmigrintoj el kiu ajn parto de la mondo, kaj foje vi devos dividi vian sidlokon kun vivanta kokino aŭ juna ŝafido. En ĉiu okazo tia vojaĝo povas fariĝi multe pli amuza, ol komforta vojaĝo per luita taksio — por ne paroli pri la ŝparita mono.

Ni daŭrigu. Se vi estas interesita je la israela popolo, kredis nin, ke ankaŭ la israela popolo estos interesita je vi (Ĉu vi venas el Kiusciaskie? Eble vi konas mian onklon, Moŝe Rabinoviĉ. Li vivas en Milano.). Vi povas ekkonversacii kun kiu ajn, kie ajn. La plej uzata, kvankam ne la plej komprenata, fremda lingvo estas la angla. Se la alparolito ne komprenas la anglan, uzu alian lingvon. Se li malaperas post via ekparolo, ne timu. Li verŝajne iris serĉi tradukanton ĉe la plej proksima butikisto. (La bofrato de la fratino de la butikisto vivas en Ĉikago).

La israelanoj ne estas konataj pro siaj etiketaj manieroj. Tamen kun la plej granda entuziasmo ili sin manprenas, ĉu viroj ĉu virinoj, kiam ili renkontiĝas. En ĉiuj okazoj 'ŝalom' estas uzata por ĉiaspecaj salutoj. Tio almenaŭ estas tre bona por ŝpari al la malfortaj lingvolernantoj la problemon lerni la hebreajn ekvivalentojn de bonan matenon, bonan vesperon, ĝis revido kaj de aliaj samspesaj esprimoj.

Ankaŭ al vi do nian plej koran
Ŝalom

G. G. P.

Supre: Jerusalemo — la monto Ciono kun la tombo de Reĝo David kaj la preĝejo de la Endormiĝo.

ISRAELO AŬ IZRAELO ?

leteroj

En n-ro 2/67 de "Esperanto" mi legis interesan artikolon pri vitrofarado en Israelo kaj Izraelo. Kio nun estas ĝusta? Israelo aŭ Izraelo ?

A. Halbedl
Knittelfeld, Aŭstrujo

Estus dezirinde iel distingi inter Izrael (= la tuta regno de David kaj Salomono), Izrael (= la norda regno, ankaŭ nomata Samario) kaj Izrael (= la moderna ŝtato), ĉar ili estas geografie ne la sama teritorio.

Donald Broadribb
Melbourne, Aŭstralio, 23 dec 66

En "Esperanto" ni sekvas la proponon iam aperintan en la gazetaro, uzi la z-formon por nomi la tutan antikvan regnon (konforme al la zamenhofa bibli-traduko) kaj la s-formon por indiki la modernan ŝtaton (konforme al la ĝenerala uzado de israelanoj). Tial povas aperi Izraelo kaj Israelo en unu sama artikolo. Por la antikva norda regno oni povus uzi ekskluzive la nomon Samario. — Red.

LA AKVEDUKTO DE AĤMAD JAZZAR

La surskribo super la bildo de la akvedukto (Februaro 1967, p. 22) ne estas ĝusta. Tiu ĉi akvedukto ne estas romia. Ĝi estas turka! Konstruis ĝin Aĥmad Jazzar en la jaro 1780. Aĥmad Jazzar estas la sama, kiu defendis la urbon Ako sukcese kontraŭ Napoleono (1799).

Bernhard Swarsensky
Hercelija, Israelo, 22 feb 67

esperanto
aprilo 1967

El Hombre en su Camino/La Homo sur sia Vojo, krestomatia lernolibro de Manuel Fernández-Menéndez. Eld. La Bona Semisto, Montevideo, 1965. 373 p. 20 × 14 cm., bind., il. 14,40 gld.*

Tri partoj formas ĉi tiun libron; la unua temas pri UN, Homaj Rajtoj, Esperanto kaj Unesko, kaj Esperanto-kulturo en Montevideo; krome, ĝi enhavas biografiojn de mondaj famuloj, kiuj energie laboris por la paco. La dua parto estas Esperanto-lernilo por hispanlingvanoj kaj enhavas interalie la fundamentan ekzercaron kaj la originalajn poemojn de Zamenhof. La trian parton okupas antologio de poeziaj pecoj verkitaj de hispanaj kaj hispanamerikaj poetoj. Proksimume 120 fotoj ilustras la volumon.

Ŝajne, "La homo sur sia vojo" celas precipe la hispanparolantajn landojn, ĉar la libro estas dulingva, t.e. la tekstoj aperas en Esperanto kaj en la hispana. Per ĉi tiu verko s-ro Fernández denove montras sian entuziasmon kaj fervoron por Esperanto, kies esencajn celojn li prave identigas kun la celoj de UN.

Ĉi-foje s-ro Fernández laboris eble tro haste kaj ne reviziis kun sufiĉa zorgo sian manuskripton, ĉar bedaŭrinde la libro bagateliĝas kaj perdas multon de sia valoro pro la mal-

alta nivelo de la lingvo.

Preskaŭ ĉiujn tekstojn de la unua parto tradukis, ne s-ro Fernández mem, sed aliaj personoj, kaj ili legiĝas kiel ordinara Esperanto. La pecojn de la aŭtoro makulas gramatikaj, stilaj kaj leksikologiaj eraroj; kelkfoje li ankaŭ misinterpretas la sencon de la originaloj.

Al la Esperanto-lernilo mankas kohera didaktika plano. Oni eksplikas la Esperantan verbon en apenaŭ kvin paĝoj, tamen oni uzas kvar por la interjekcioj. Oni mistradukas kelkajn vortojn: *interhelpo* ne signifas *ayuda mutua*, sed *mediación*; *laborulo* ne estas *hombre muy trabajador* sed simple *trabajador*; nek *interisto* (?) nek *interulo* signifas *intermediario*. Krome, kion faras — en lernilo! — la vorto *meretrice*, kiu kviete mortadas en la paĝoj de *Parnasa gvidlibro*?

En la poezia parto, kie oni malobservas ankaŭ ĉiujn poetikajn regulojn, la Esperantaj tradukoj, escepte de du tri pecoj, estas aŭ mizeraj karikaturoj de la originaloj, aŭ galimatioj kaj rebusejoj.

Dum la legado elsaltis al miaj okuloj 30 preseraroj, kiuj ne troviĝas en la erar-listo de la libro.

F. de Diego (Hispanujo)

CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081

TERMINAROJ SERĈATAJ

Por la nuna stadio de la agado ĉe Unesko, CED bezonas havi je dispono kiel eble plej multajn fakajn kaj teknikajn terminarojn de Esperanto. Tial ĉiuj personoj, kiuj posedas tiajn terminarojn, kiujn ili povas fordonaci al CED, estas urĝe petataj adresi ilin al: Centra Oficejo de UEA (por CED), Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Precipe bezonata estas Scienca kaj Teknika Terminaro (Haferkorn kaj Dellian, 1956).

ESPERANTLINGVAJ RADIO-ELSENDOJ EN 1966

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por la radio, s-ro G. Larglantier, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1966 estis 2290, kompare kun 1807 en 1965 kaj 1622 en la jaro 1964. La elsendoj entute daŭris 769.30 horojn, kompare kun 662.50 horoj en 1965 kaj kun 518 horoj en 1964. La nombro de stacioj estis 23 en 15 landoj, kompare kun 25 en 13 landoj en 1965 kaj kun 22 en 11 landoj en 1964.

La nombro de elsendoj kaj kvanto de pro-

gramoj en 1966 estis pli altaj, ol en kiu ajn periodo en la lastaj 14 jaroj. Plej multnombrajn programojn havis radio Varsovio (365) kaj radio Budapeŝto (365). Sekvas Pekino (312), Bern (208), Madrid (117) k.a.

KURAĜIGA LETERO AL CED

S-ro E. F. Dean, Norwich, Britujo, kiu en la lastaj jaroj regule subtenis CED per donacoj, skribis en letero al la Oficejo de CED komence de januaro:

"Kiel mi promesis, mi nun sendas altigitan donacon de £8. Se la Dio permesos, mi esperas sendi al CED dum 11 monatoj po £8 kaj unu monaton mi sendos 12 pundojn, do entute £100 dum la jaro 1967. Mi faris tiun decidon pro la grandega kaj sindediĉa laboro, kiun vi plenumas por niaj Movado kaj idealoj. Ĝi estas tributo speciale pro viaj laboroj ĉe UN en New York kaj pro la grava agado ĉe la esperantistoj en Usono. Sendube granda rikolto sekvos en la estonteco."

La decido de s-ro Dean signifas ne nur grandan materian helpon al la laboro de CED, sed estas ankaŭ kuraĝiga por ĉiuj ĝiaj kunlaborantoj. CED jam esprimis dankon al s-ro Dean pro lia imitinda subteno, sed ĝi deziras ankaŭ publike tutkore danki al li, ĉar ĝuste de tiaj personoj, kiuj komprenas la gravecon de CED, multilate dependas la amplekso de ĝia laboro.

Martín Fierro, de José Hernández. El la hispana E. Sonnenfeld. Eld. Stafeto, La Laguna, 1965. Serio Oriento-Okcidento n-ro 5. 289 p. 21 × 15 cm., tolbind.* 14,40 gld.

La volumo enhavas, krom la eposo, enkondukon de d-ro Ivo Lapenna, antaŭparolon de la tradukinto, prezenton de Julio Mafud, profesoro pri literaturo kaj sociologio ĉe la universitatoj de l' Sudo kaj de l' Litoral en la respubliko Argentino, desegnojn de la artisto Enrique Rapela kaj apendicon de prof. Juan Régulo-Pérez.

Martín Fierro estas unu el la plej raraj juveloj en la monda literaturo, sed multe pli valora ĝi estas en la literaturo Esperanta, ĉar troviĝas multaj lingvoj, en kiuj ĝi ne estas tradukita (ekz. la finna, kiu tamen enhavas preskaŭ ĉiujn naciajn kaj popolajn eposojn de la mondo tradukitajn). Do, la Esperanta Martín Fierro apertas almenaŭ al la esperantistoj, apartenu ili al kiu ajn nacio, la eblecon ĝui kaj miri.

Kial miri?

Martín Fierro frapas per sia enhavo eksterordinara, per la rakonto pri la gaŭĉa epoko en Argentino. La poemo parolas realisme, sed la impresoj transformas sin preskaŭ fabla. La plej dominanta trajto estas la tragiko de la homa senhelpeco sub la premo de la besteco kaj malico akumulitaj en homoj, kies karaktero diferencas aŭ denature aŭ deevolue. La gaŭĉoj — laŭ la eposo — estis primitivaj sed honestaj, iliaj najbaroj, indianoj, estis ankaŭ primitivaj sed perfidemaj, sed la plej kruela kontraŭ la gaŭĉoj estis la mondo "civilizita"; kontraŭ ĝi ili povis batali nek per lazo nek per tranĉilo, ĉar ĝia inklino al maljusteco superis iliajn spiritajn kaj fizikajn fortojn farante ilian vivon infero. En la eposo ĉi tiu infero brulas nur ĉirkaŭ Martín Fierro kaj kelkaj liaj proksimuloj, sed envere ĝi minacis gluti — kaj fine eĉ glutis — la tutan pampan popolon, kiu deziris teni sin nur vivanta. La naturdotita saĝo, kiun tiu popolo, aŭ la plej inteligenta parto el ĝi, havis, estis nesufiĉa por la mondo "civilizita", eĉ se tio sufiĉis vegeti sur la pampo.¹

Tio pri la enhavo de la eposo. La farado de la tradukaĵo certe konsistis el tre multaj malfacilaĵoj, ĉar la sferoj de la vivo estas en ĉiuj antikvaj eposoj kaj epopeoj tre fremdaj al la nuna tempo. Esperantigantoj devas tiujn sferojn retrovi. La elasteco de Esperanto faciligas tion, sed en tio kaŝiĝas ankaŭ danĝero: la natura vortordo eble tro perdiĝas kaj la lingvaĵo devias de la lingvo simpla, kutime parolata kaj skribata. Preskaŭ la sola

punkto, kiu en poemaj tradukoj ĝenerale ĝenas, troviĝas en tio. Ankaŭ s-ro Sonnenfeld ne ĉie povis tion eviti, eble pro tio, ke li — laŭ mia opinio — tro sklave sekvis la ritmon kaj la rimadon de la originalo. Sufiĉus, se — en la sesversaj strofoj — estus nur du rimparoj kaj ne rimparo plus rimtrio.

Pri la mallongigoj de vortoj en la tradukaĵo oni povas diskuti kaj disuti. Laŭ mi, oni devus en poezia lingvo permesi certajn liberecojn, eĉ "reformi" la lingvon ekz. koncerne al la verboj "esti" kaj "havi", kelkaj personaj pronomoj, tn. tabelvortoj ktp., sed jen ne estas ĝusta loko por fari proponojn... Unu "invento" lingva en la tradukaĵo min ĝojigas, la uzado de "ek" ekz. en la formo "ekproksimi" = (ek)fariĝi proksima.

Mallonge: malgraŭ la kelkfoje tre komplika vortordo la tradukaĵo estas lingve perfekta kaj donas ĝuon, post kiam oni legas iom el ĝi kaj kutimiĝas al la inversioj. Mi mem legis ĝin sen paŭzo kaj ĝuis preskaŭ kiel pri kolora filmo, kies bildaj panoramoj tremigas. Por tiu "filmo" kreas bazon ankaŭ la prozformaj, kaŭzintaj surprizojn almenaŭ al mi, skriboj flanke de la poemoj. La legantaro povas esti fiera, ke ĝi havas ankaŭ ĉi tiun eposon presita.

Fine: por pacigi la homaron ne sufiĉas la penoj de la aŭtoritatuloj. La nacioj kaj la popoloj devas serĉi vojojn por kompreni la karakterojn bazajn de la aliaj. La eposoj kaj la epopeoj, kiuj ilustras epokojn pli primitivajn, ol la nunaj estas, malkaŝas multon. Tial — pli da eposoj kaj epopeoj! Precipe el la malproksima oriento, kies lingvojn nur malmultaj okcidentanoj scias! Sed, antaŭ ol la eldonistoj povas nin servi por tio, ni devas ankaŭ aĉeti valorajn, esperantigitajn verkojn. Pro naciaj bagateloj ni malŝparas multe, dum en Esperanto troviĝas jam vere aĉetindaj verkoj ne pli multekostaj.

Joh. Edv. Leppäkoski



NEKROLOGOJ

HARRY EDWIN FACER

Mortis la 5-an de januaro 1967 s-ro H. E. Facer, Herald Island, Nov-Zelando, Delegito de 1936.

CHARLES RICARDO STEPHEN BARRETT (1871-1967)

En Christchurch, Nov-Zelando, mortis je 9.2.67 s-ro C. R. S. Barrett, VD kaj Delegito de 1909 ĝis 1958. Li lernis Esperanton en 1906.

JOSEP PRATDESABA (1870-1967)

Antaŭ nelonge mortis en Vich, Hispanujo, la fama astronomo Josep Pratdesaba, 96-jara. Li lernis Esperanton en 1906.

DANIEL LLORENS SASTRE

En Valencia mortis d-ro Daniel Llorens Sastre, iama prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj malnova membro de UEA.

¹) Pampo: La vasta argentina ebenaĵo.

Ĉiujn eldonaĵojn signitajn per steleto oni mendu ĉe UEA, la aliajn ĉe la koncerna eldonejo.

La feliĉo kaj 6 aliaj kantoj, de Ramona van Dalsem. Eld. UEA, Rotterdam, 1967. Disko 33 r/m, 15 min., 18 cm., fleksebla. 2,50 gld. (10 st.)*

Fine ni povas pruvi al la medioj ne konantaj Esperanton, ke la lingvo estas tiel vivkapabla kaj bela kiel neniam antaŭe, kaj ke ĝi tiel plezure sorĉas la orelojn, ke oni ne povas ne entuziasmiĝi.

Ramona van Dalsem, kantistino - kion diri. Estas nekredeble! Ŝi ne nur belege kantas, sed ŝi ankaŭ mem verkis kaj komponis la plimulton el la kantoj. Ke ŝi estas krome kaj juna kaj ĉarma estas plia faktoro, kiu igas nin esperi, ke ankoraŭ dum multaj jaroj ŝi daŭrigos sian krea aktivecon.

La akompano de Toos Schoonman estas agrabla kaj lerta, neniam altruda, sed tamen donas la ĝustan fonon al la voĉo de la kantistino.

Ne estas dubo, ke la disko vekos atenton en kaj ekster la kadroj de la Esperanto-movado, kaj ni esperu, ke ne pasos longa tempo, ĝis ni denove aŭdos de Ramona van Dalsem.

Torben Kehlet (Danujo)



Dorse kontraŭ la muro, de P. Wybenga. Div. trad. Eld. Frisa Akademio, Ljouwert, 1966. 164 p. 20 x 13 cm. Milittempaj rakontoj. Broŝ. 9,90 gld.; lede bind. 16,90 gld.*

La kuŝanta antaŭ ni libro viciĝas en tiun ĉenon da literaturaĵoj, kiujn, postmilite, elvokis la vandalaĵoj de la nazioj, kiuj enportis sian brunan peston kun mortiga kaj dezertiga radikaleco en preskaŭ ĉiujn landojn de la Eŭropa kontinento. Tra la paĝoj de la volumo ni ekscias pri la teruraĵoj, kiujn ili plenumis en Frislando, kie la eksterma furiozo ankaŭ unuavice celis la judojn. Tiel la temaro proksimiĝas al la rakontoj de Anne Frank, al "Medalionoj" de Nałkowska kaj al la romano de Teodoro Schwarz. Sed malgraŭ ĉia teroro kaj tiraneco ne estas detruibla kaj elviŝebla la humaneco kaj homamo de la trafitoj, kiuj, spitante propran vivoriskon, ne hezitas alporti helpon al la persekutatoj. Laŭ literatura vidpunkto la rakontoj ne estas valoraj, sed ili estas tamen elokventa monumento por tio, ke nenia malhoma reĝimo povas daŭri eterne, sed ke, finfine, ĉiam venkos la homeco.

La libro estas eldonita de la Frisa Akademio, kiu preparas nun serion da aliaj titoloj. La lingvaĵo estas simpla, senpretenda kaj plejparte korekta, malgraŭ iuj idiotismoj.

Reinhard Haupenthal (Germanujo)

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo "Esperanto" principe recenzas ĉiujn duope ricevitajn novajn librojn, broŝurojn kaj diskojn. Unuope ricevitajn, kiel ankaŭ politikajn aŭ religiajn eldonaĵojn, ĝi nur mencias. Nepetitaj recenzoj ne aperas. Novajn turismajn prospektojn ni ne plu mencias en "Esperanto", sed en la Jarlibro 1967 aperas la litero P apud ĉiu loko, pri kiu ekzistas prospekto en Esperanto.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Kemiaj afiksoj, de Jan Pióro. Eld. Wydawnictwa Naukowo-Techniczne, Warszawa, 1966. 36 p. 17 x 12 cm. 1710 ekz. 1,25 gld.*

Kie boacoj vagadas, de Eija Salovaara. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj, 1967. 69 p. 21 x 15 cm. Originala novelaro. 4,50 gld.*

Esperanto - libera lingvo, de Vilho Setälä. Eld. Fondumo Esperanto, Helsinki, 1967. 11 p. 15 x 10 cm. Represo el "Esperanta Finnlando". 0,40 gld.*

Praktika vortaro hebrea-Esperanta, de Josef Murĵan. Eld. Esperanto-Ligo Israela, Tel Aviv, 1966. 235 p. 16 x 10 cm., multobl., bind.*

Senmatrikulaj artilerianoj. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1966. 117 p. 19 x 13 cm. Diversaŭtoraj batalrakontoj. 1,— gld.*

La gas-eskalado kaj la monda opinio. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1966. 34 p. 19 x 13 cm., ilustr. 0,40 gld.*

Bulgario ĉe internaciaj konkursoj kaj festivaloj. Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, Sofio, 1961. 71 p. 20 x 14 cm., ilustr. 3,60 gld.*

Nigramara bordregiono de Burgas. Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, Sofio, 1962. 62 p. 17 x 12 cm., ilustr. Gvidlibro.

Patro, la horo alvenis. Ekumenaj preĝoj, el la germana tr. Kurt Schweizer. Eld. Ekumena Esperanto, Svislando, 1966. 53 p. 15 x 10 cm., ofsetita. 1,75 gld.*

Gramatiko de Esperanto, de Violin Oljanov kaj Kunĉo Válev. Eld. Nauka i Izkustvo, Sofio, 1966. 213 p. 20 x 14 cm. 6080 ekz. Bulgarlingva.*

Romeo, Julieta kaj la tenebro, romano de Jan Otčenášek. El la ĉeĥa: Vladimír Váňa. Eld. Stafeto, La Laguna, 1965-7. Beletraj kajeroj n-ro 26. 175 p. 18 x 12 cm.* 6,50 gld.

Ĉielarko, versa fabelaro de Julio Baghy. Eld. Stafeto, La Laguna, 1966. Beletraj kajeroj n-ro 27. 111 p. 18 x 12 cm.* 4,30 gld.

LAŬFAKE

Familioj

● Aperis jam la unua eldono de "Gepatra bulteno" sub aŭspicio de UEA. La 28-paĝa kajero enhavas artikolon de Edwin de Kock pri denaska instruado, rakonton por infanoj, artikolon pri kantoj en Esperanto, diskutojn pri edukado, ktp. Jarabono (4 ilustritaj numeroj) kostas 3,50 gld. (14 st), pagebla per UEA.

Mondfederalismo

● Norvega Esperanto-Ligo petas partoprenontojn de la Mondkongreso de Mondfederalistoj (Oslo, 31 julio ĝis 6 aŭgusto) skribi al Klubo Esperantista en Oslo, Boks 942 Sentrum, Oslo 1, kiu eventuale preparos specialan aranĝon.

Ornitologio

● La Internacia Ornitologia Asocio, fondita en 1965, akceptis krom la angla, franca, nederlanda, germana kaj itala ankaŭ Esperanton kiel oficialan lingvon. Ornitologia Rondo Esperantlingva, kunlaboranta faka asocio de UEA, aliĝas al IOA kaj havos reprezentanton en ĝia estraro.

Religio

● Pentraĵo de "Nia Sinjorino de la Espero", verko de P. Arcangelo Intreccialagli, ricevis solenan benon de la Papo en ĝenerala aŭdienco la 22-an de februaro. Alportis ĝin grupo da romaj esperantistoj.

Sindikatoj

● La 14-an de decembro 1966 d-ro Mór Korach, membro de la Scienca Akademio de Hungarujo, Honora Prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, direktis al la Monda Sindikata Federacio kaj al la kunveno de ĝia Ĝenerala Konsilo en Budapeŝto forte argumentitan alvokon, ke tiu organizaĵo metu en sian tagordon la ĝeneralan instruadon de Esperanto en la sindikatoj.

Sonbendoj

● La organizaĵo Sonbendamikoj Esperantaj (Crutchfield Brae, Hookwood, Horley, Surrey, Britujo) havas 140 membrojn en 24 landoj. Ĝi estas aliĝinta al ILEF. Nun ĝi iniciatis ankaŭ sonbendan kurson bazitan sur la sukcesa lernolibro "Teach Yourself Esperanto" kaj jam akiris kursanojn en pluraj landoj.

Stratoj

● Novajn Zamenhof-stratojn havas: S. Feliu de Codinas, Hispanujo (de 16.10.66), Rio Ceballos, Argentino (6.1.67) kaj Chorzów, Polujo (1.2.67). Esperanto-straton havas Albenga, Italujo, de 23.10.66.

Turismo

● Estrarano de UEA s-ro M. Jaumotte lanĉis novan revuon "Esperanto-turismo" okaze de la Internacia Jaro de Turismo 1967. La unua kvaronjara kajero havas 24 grandformatajn, multobligitajn paĝojn kun presita kovrilo. La ilustraĵoj estas parte plurkoloraj. Jarabono kostas 5,— gld., pagebla per UEA.

● La luksa kolorilustrita revuo "Ripozoj",

kiu nun komencas sian 4-an eldonjaron, estonte enhavos artikolojn ne nur pri turismo sed ankaŭ pri la Esperanto-movado. Konsentis kontribui prof-oj Lapenna, Bokarev, Waringhien; d-ro Unger; s-roj Bernard, Jaumotte, Duc-Goninaz k.a.

LAŬLANDE

Aŭstrujo

● Aŭstria Esperantista Federacio organizas Eŭropan Esperanto-Kongreson en Innsbruck, 23-30 julio 1967. Festparolos Tibor Sekelj. Jar-kunvenos ILEI.

Britujo

● La nova eldono 1968 de "Encyclopaedia Britannica" enhavas artikolon pri Esperanto verkitan de Marjorie Boulton.

Bulgarujo

● La 12-an de februaro 75-jariĝis ak. Atanas D. Atanasov, Esperanto-lektoro en la Universitato de Sofio.

Finnlando

● S-ro Vilho Setälä, honora membro de UEA, akademiano, konata aŭtoro de lernolibroj, festas la 4-an de aprilo sian 75-jariĝon.

Japanujo

● Radio Nippon 3-foje elsendis intervjuojn kun gejunuloj ĉeestintaj la 51-an UK. Sur la foto maldekstre: anoncisto, N. Syozi, Y. Muramatu; dekstre anoncistino, f-ino N. Nozima (Miss Esperanto 1966) kaj f-ino K. Ozawa.

Soveta Unio


● Montriĝis erara la informo (aprilo 1966), ke aperos ruslingva verko "Pri internacia lingvo de scienco" de E. Lemberg. En 1967 aperos libro de Svadost "Kiel estiĝos tutmonda lingvo?", laŭ kiu Esperanto ne taŭgas por tiu rolo.

Vjetnamujo

● Fondita en 1956, Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (Hanojo) en sia unua dek-jara periodo distribuis al kursfinintoj 2500 unuagrada kaj pli ol 700 duagrada atestilojn pri lernado de Esperanto.

Vidu: Japanujo





LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

TEJO OKAZIGIS DUAN SEMINARION POR GVIDANTOJ en Bruselo de 3 ĝis 10 januaro 1967, organizita de la Komisionoj por edukado kaj NEJOj. En ĝi partoprenis unuafoje ankaŭ reprezentantoj de NEJOj. El la Esp. junularaj organizoj nur STELO, TEJO, JEFO kaj NEJ estis reprezentitaj. Bedaŭrinde aliaj landaj sekcioj ne profitis ĉi tiun unikan okazon.

En tiu malgranda grupo naŭpersona la programo, prezentita de deko da eminentaj spertuloj fariĝis tre sukcesa. Kvankam esence laborkunveno, aranĝita je tre malalta prezo en junulargastejo, la etoso estis elstare bona.

Ĉiuj prelegoj estas registritaj (aŭ traduke resumitaj) sur bendo (4³/₄ cm/sek., 4 trakoj), havebla je 11,— gld. ĉe la red. de LJV. Ĉe li oni ankaŭ povas peti stencilitan raporton kun la "konkludoj". Unu el la konkludoj: landaj sekcioj imitu ĉi tiun ekzemplon, naciskale!

FONDIĜIS INFANA SUBORGANIZO DE HEJ

La dua "Konferenco de Lernejoj" en Graz rekomendis aktivigi la lernantojn en lernejaj kursoj, kaj varbi ilin al la movado. HEJ estis unu el la malmultaj sekcioj de TEJO reprezentitaj en Graz, kaj nun fondis infanan suborganizon por plenumi la rekomendon. Pli ol 60 gelernantoj 10-16-jaraj partoprenis la fondkunvenon, kaj poste sukcesegan Nikolao-vesperon. S-ino Mária Benczik, estrino de la suborganizo (samtempe gvidantino de la Lerneja Fakto de HEJ) antaŭvidas, ke fine de 1967 la membronombro atingos 500. La suborganizo partoprenas en "Grajnoj en Vento" kaj krome eldonas cirkuleron, verkitan de la gelernantoj.



Estraranoj de HEJ dum la bankedo: de maldekstre, Mária Benczik, László Pethő, Vilmos Benczik, Lajos Szakácsi.

KOMITATKUNSIDO DE HEJ.

La Komitato de HEJ, kunsidante en decembro 1966, pritraktis la raportojn pri la laboro de HEJ kaj la 22-a I.J.K. Ĝia konkludo estis (ne malatentante la malglataĵojn), ke la kongreso laŭ la ĉefaj vidpunktoj estis sukcesa kaj multe kontribuis al la en- kaj eksterlanda prestiĝo de HEJ.

La komitato akceptis laborplanon por 1967, kiu antaŭvidas i.a. junularan Esp.-festivalon, seminarion por gvidantoj, firmigon de la infana suborganizo, kreon de Esperantologia rondo, ktp.

SKOLTAJ ESPERANTISTOJ EN LA MONDEKSPOZICIO

Inĝ. U. P. Ronald, membro de la kanada SEL-sekcio, sukcesis ricevi permeson por starigi budon pri SEL en la Junulara pavilono de la Monda Ekspozicio en Montreal.

Por la diversaj landaj pavilonoj la mono alfluas en torentoj. S-ro Ronald klopodas per modestaj rimedoj atingi same bonan aspekton. Liaj ĉefaj bezonoj estas: volontuloj por deĵori, faldfolioj en la angla kaj franca lingvoj pri E-o, kaj mono. Adreso: S-ro U. P. Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Quebec, Kanado.

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ EN POLLANDO

Okaze de la Internacia Jaro de Turismo, "JUVENTUR" (la pola turisma oficejo por la junularo) aranĝas, kune kun Pola Esp. Junularo, "**Internacian Turisman Kunvenon**", en Bydgoszcz, de 20 ĝis 28 aŭgusto 1967. La programo elstaras pro allogaj ekskursoj: en la urbo, al Torun (ŝipe), kaj al aliaj lokoj. Folkloro vespero, koncerto, diskutoj, filmoj, prelegoj, sportaj konkursoj, balo kaj tendarfajro estas kelkaj aliaj eroj. Sukceso de la aranĝo signifos gravan kontribuon de la Esp. junularo al la Jaro de Turismo, kaj certigos favoran sintenon de la polaj aŭtoritatoj por sekvontaj aranĝoj.

Rajtas partopreni esp. junularo ĝis 30-j. je kotizo egalvalora al \$ 33,—.

La informan bultenon petu de: JUVENTUR, Al. Róż 2, **Warszawa** 61.

La dua **STELO-kongreso** okazos samtempe kun la **Internacia Esperanto-Seminario** en Torun dum 27 aprilo–3 majo 1967. Ĝi ĉefe pritraktos sciencajn problemojn. Okazos tri konkursoj (i.a. "80 jaroj de Esperanto en scienco"), prelego de A. Pettyn pri instrumentoj de E-o, diskutoj, komitatkunsidoj de STELO, teatraj prezentoj, balo, kaj du ekskursoj.

Antaŭ la kongreso kaj seminario en Torun okazos en Łódź, 23-26 apr., la dua **Internacia Studenta Seminario** pri la temo "Nuntempa pola filmo".

Por la kongreso kaj seminario en Torun la kotizo estas 225 steloj; nemembro de STELO: 250 steloj. La informan bultenon pri ĉiuj tri aranĝoj petu de: Studenta Scienca Rondo de Esp-istoj, Moniuszki 16/20, **Torun**.

Alta Protektanto: Zalman Sazar, Statprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO N-ro 6

Dua Bulteno. Ĝi aperis antaŭ pluraj semajnoj. Ĉiuj bonvolu nepre sendi siajn plenigitajn mendilojn por loĝado, ekskursoj, karavanvojaĝo ktp. kiel eble plej baldaŭ por eviti seniluziigojn.

Klimato. Ŝajnas, ke multaj timas troan varmon dum la kongresa periodo. Ni atentigas, ke dumtage Tel Aviv havas ĉiam iom da agrabla vento de la maro, kaj ke hoteloj kaj kongresaj ejoj estas klimatizitaj, same kiel aŭtobusoj.

Foto-konkurso. Ni atentigas, ke, kontraŭe al la informo en la Dua Bulteno, la **minimuma**

formato de la fotoj estas 13 x 18 cm.

Oratora konkurso. La Estraro de UEA aprobis jenajn temojn por la Oratora Konkurso en Tel Aviv:

1. Turismo kaj internacia kompreniĝo;
2. La kleriga rolo de turismo;
3. La signifo de la hebrea kulturo por la monda kulturo.

Eventualaj kromaj temoj aperos en la Kongresa Libro. Kiel kutime, la premioj konsistas el 100,— gld., 70,— gld. kaj 40,— gld. La nomo de la unua premiito aperas sur la pokalo Ivo Lapenna. Rajtas konkursi ĉiuj malpli ol 29-jaraj.

Statistiko (ĝis 17 mar 67). Arg. 4, Aŭstral. 6, Aŭstrujo 11, Bel. 15, Bra. 2, Bri. 43, Bul. 29, Ĉeĥ. 19, Dan. 22, Fin. 3, Fra. 109, Ger. 18, Gre. 3, His. 10, Honk. 1, Hun. 40, Isr. 99, It. 33., Jap. 4, Jug. 23, Kan. 5, Monako 5, Ned. 32, Norv. 6, NovZ. 2, Pol. 95, Portu. 2, Rum. 2, Sov. 4, Sve. 29, Svi. 9, Uso. 25, Ven. 1. Entute (33 landoj): 711.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario



Sin prezentas membroj de LKK de la 52-a Universala Kongreso: (Starantaj) D-ro Maschler, ekskursoj; s-ino Shor, Infana Kongreseto; s-ro Ben-Alter; s-ro Israeli; s-ro Perlman; s-ro Drezner. (Sidantaj) Mag. Dratwer Esperanta Gazetara Servo; s-ro Giladi, protokolsekretario; mag. Dratwer, vic-prezidanto; prof. Kohen-Cedek, prezidanto; inĝ. Savir, vic-prezidanto; s-ino Wunderbaum, artaj aranĝoj; s-ro Pompilio, KKS.

Generalo de Gaulle (okaze de la 20-jara datreveno de Unesko): "Francujo donas al la mondo lingvon bonege adaptitan al la universala karaktero de la pensado."

William Benton, usona ambasadoro al Unesko: "En nia epoko la angla lingvo transprenis la lokon de la franca kiel ĉefa lingvo en la sfero de diplomatio, en la bazaro kaj eĉ en la buduaro."

Kai Laitinen, finna literaturisto: "La estonoj estas la sola popolo en la mondo, kiu povas legi finnlingvan tekston sen profunda studo. Ne mirinde, do, ke finnaj aŭtoroj kelkfoje sentas, ke ili troviĝas sur fora insulo, de kie

iliaj voĉoj neniam povas atingi la orelojn de aliaj."

Franca Esperantisto: "Kreiĝis ankaŭ la Hinda Instituto de Esperanto, kiu laboras tute sen mono, bedaŭrinde, dank'al la sindonema sekretario" Sinregalema, ŝajne

Johann Wolfgang v. Goethe: "Mi opinias la ellernon de unu komuna eŭropa lingvo Esperanto afero urĝe necesa Ĝia gramatiko estas ludfacila, tiel ke Hamleton mi jam tra legis en traduko". (Laŭ la gazeto "Rio Esperantista". Evidente necesos korekti la biografiojn pri Goethe, ĉar oni ĝenerale opinias, ke li mortis en 1832.)

citaĵoj

esperanto
aprilo 1967

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1966, 1-a parto, p. 170. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.50 m (9525 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.01 m (9675 kcs), 25.34 m (11840 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
	19.30-19.45	Budapest, 240 m (1250 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 42.25 m (7100 kcs). I.P. Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 47 m, 40 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 25 m, 19 m. I.
	20.00-20.20	Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.05-20.30	Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	23.30-23.55	Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216 m (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	12.00-12.10	Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.88 m (17770 kcs), 13.98 m (21460 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
	22.45-23.00	Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	6.45- 6.55	Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	12.00-12.10	Bern, Kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
	18.45-19.00	Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.30-23.55	Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	21.45-21.55	Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.40 m (11810 kcs). P. (D-ro Baur)
	23.05-23.20	Zagreb, 264 m (1133 kcs), P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	14.30-14.40	Wien, 203 m (1475 kcs), 97.9 Mcs (MF). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	20.00-20.30	Pekino, 45 m, 42 m, 39 m, 38 m, 32 m. I.
	21.30-21.40	London, 49 m (6110 kcs), 31 m (9510 kcs), 25 m (12040 kcs), 19 m (1539 kcs). I. B.B.C., Esperanto, Bush House, London W.C. 2, Britujo. (Nur la lastan vendredon de ĉiu monato).
Sabato	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	21.45-21.55	Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro C. Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191 m (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

NOTO: La stacioj Warszawa, Pekino, Bern, Roma regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

RADIO ROMA. Detala programo por aprilo aperis en la marta numero.

RADIO WIEN elsendas nun per du ondlongoj aŭdeblaj nur interne de Aŭstrujo. Mallongaj ondoj ne plu estas uzataj por la esperantlingva programo. Utile estus sendi multnombrajn leterojn al la stacio por peti la reuzadon de la antaŭaj mallongaj ondoj kapteblaj el eksterlando, kiuj portis Esperantan voĉon dum la pasintaj 22 jaroj. Oni skribu al Radio Wien, Argentinierstrasse 30a, Wien IV, Aŭstrujo.

BBC. Diverslandaj aŭskultantoj, por kiuj estas malfacile aŭskulti antaŭ la lasta labortago de la semajno, petis ŝanĝi la dissendotagon de ĵaŭdo al vendredo. Oni do aŭskultu je la jenaj datoj: 28 apr, 26 maj, 30 jun, 28 jul, 25 aŭg, 29 sep.

FOTO DEKSTRE: La novgeedzoj Anica kaj Terence Page (ŝi — slovenino, li — anglo) post radiointervjuo en Esperanto ĉe la Londona radiostacio, la 23-an de februaro. Dekstre: la Esperanto-anoncisto de BBC, Nikolaj Rytjkov. BBC volonte sendas tiun foton al la aŭskultantoj de la Esperanto-programoj kaj al ĵurnalistoj.

GAJNIS LOTO NO. 819!

En la revuo Esperanto de decembro 1965 ni lanĉis por 1966 kampanjon por nova milo da individuaj membroj, kun lotumata monpremio de 500.— gld. Komparo de la membrostatistikoj en la martaj numeroj de 1966 kaj 1967 montras kreskon, se ne de mil individuaj membroj, tamen de kelkaj centoj da ili.

Laŭ la informoj ricevitaĵ, 125 el ili estis varbitaj de aliaj membroj. Ĉar en kazo de mil varbitoj estus lotumita sumo de 500.— gld, inter la 125 varbintoj do nun estas lotumita la okono de tiu sumo, nome 62,50 gld (250 steloj).

Kun plezuro ni povas informi, ke la gajninta numero, solene eltirita el la lotoj fare de la revizoro s-ro B. C. Storm, estas
no. 819.

Ni afable petas la posedant(in)on de tiu numero tuj sendi sian loton al la Centra Oficejo. Post ricevo ni konfirmos al li aŭ ŝi la bonhaston de 62,50 gld je dispono. Se la gajninto ne estos anoncinta sin antaŭ 31.12.1967, la premio forfalos.

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstralio

Brisbane. VD: H. V. Petley, emerito, 88 Verney Rd., Graceville; tel. 79-4168.

Brazilo

Cáceres (Mato Grosso) 28 000. D: H. H. Ubat, misiisto, C.P.33. FD (Kristanismo evangelia): la D.

Ilhéus (Bahia) 105 000. D: E. Leonardo de Sá, komercisto, Rua Marquês de Paranaguá 109 s/3, C.P. 72; tel. 2.4.6.0. FD (Komerco): la D.

Juiz de Fora. FD (Juro: brazila laborleĝaro) & (Stenografio): J. F. Marcílio Filho, profesoro, Avda Perry 217; tel. 4964.

Olinda (Pernambuco) 110 000. D & FD (Turismo): F-ino Luzia Céla da Silva Reis, komerc-oficistino, Rua Manoel de Barros Lima 499; oficejo: Rua da União, Ed Sumaré, Loja 3, Recife; tel. 26775/6/7.

Recife. FD (Turismo): la FD (Turismo) en Olinda.

Rio de Janeiro. FD (Fervojo): João Olivio de Mello, em. oficisto, Praça da República 54-2º; tel. 42-4357.

São Miguel Paulista (São Paulo) 80 000. VD & FD (Jurnalismo): O. Pires de Holanda, ĵurnalisto, Rua Tenente Luís Fernando Lobo 27.

Britujo

Hastings (Sussex) 66 000. FD (Higieno): K. Hadler, higieninspektoro, "Croft House", The Croft; tel. 2427 (hejmo); 28272 (oficejo).

Bulgarujo

Karlovo. D & JD & FD (Esperanto-instruado): Bojidar Leonov, studento, str. Car Asen 7.

Ĉeĥoslovakujo

Abertamy (Čechy) 1 800. D: Jan Dolejš, 190 Hotel Uran; tel. 20-2.

Nitra (Slovensko) 50 000. D: MUDr. Teodor Rosinský, psiĥiatro, Štúrova bl. B/4; tel. 39351.

Polička. D: Blahoslav Štefek, instruisto, Tyršova 3. FD (Edukado) & (Ekonomio agrokultura): la D.

Šlapanov (Čechy) 1 000. D & FD (Filatelo): Frank Tichý, librotenisto, Šlapanov 87 ĉe H. Brod.

Žilina (Slovensko) 40 000. FD (Edukado): František Révay, tek. tradukisto, Moyzesova ul. č.40.

Danlando

Haderup. FD (Arĥeologio), (Botaniko) & (Geologio): la D.

Finlando

Helsinki. JD: Seppo Tella, studento, Pieni Roobertink. 4-6 M 70 Helsinki 13; tel. 90-666 707.

Jyväskylä. VD: Eino Lehtonen, ŝoforo, Latvatie 16. FD (SOS-aŭto-servo) & (Turismo): la VD.

Kuopio. FD (Radioamatorismo, OH7QS): Jaakko Lehtinen, studento, Juлкula, Puijonsarvi; tel. 971-21926.

oficiala informilo
n-ro 400, 1 mar. 1967



esperanto en radio:
vidu kontraŭan paĝon

Sippola (Kymen lääni) 16 000. D & FD (Abelkulturo): Jalmar Vakkari, abelisto, Koivula Inkeroinen.

Francujo

Ales (Gard) 45 000. D: Emile Cornut, skribisto de notario, 12 Rue de l'Abbaye.

Arras. FD (Turismo): la FD (Instruado).

Calais. FD (Komerco: punto): Fernand Dita-crouste, sekciestro, 178 Chemin Castre; tel. 34-45-90 (laborejo).

Cassis. D: la FD (Turismo).

Fontainebleau. FD (Muziko): la D.

Paris. JD: Marie-thérèse Liouville, studentino, 6 rue Léon Vaudoyer, 75-Paris (7e); tel. SUF 19-36.

Valenciennes. VD: Jacques Telle, geometro, 2 Chemin des Fosses.

F-68-Vieux-Thann (Haut-Rhin) 4 000. D & JD: André Grossmann, industria desegnisto, 3 rue de Bretagne.

F-47-Villeneuve sur Lot (Lot et Garonne). D: Michel Romano-Joly, inĝ.-konsilanto, 21 route de Bias.

Germanujo

D-33 Braunschweig (Niedersachsen) 245 000. D: Rudolf Grosser, pensiulo, Ottenroderstr. 54.

Hamburg. JD: Peter Kühnel, studento, D-2 Hamburg 72 (Berne), Pferdekoppel 16; tel. 6 44 87 28.

D-6900 Heidelberg (Nord-Baden) 130 000. FD (Turismo): Karl Link, pensiulo, Mozartstr. 13, D-6704 Mutterstadt; tel. 357.

D-6700 Ludwigshafen (Rheinland-Pfalz) 140 000. JD, FD (Blinduloj) & (Ŝako): Hartmut Schreier, telefonisto, D-6700 Ludwigshafen-Mundenheim, Lindelbronn-Str. 1; tel. Städt. Krankenhaus 50.31.

D-3559 Röddenau (Hessen) 1 400. JD: Reinhold M. Eberhardt, ilfaristo, Jahnstr. 10.

D-7255 Rutesheim (Württemberg) 6 000. FD (Inĝenieraj aferoj): Hans Badstieber, inĝ., Pforzheimerstr. 39.

Schwelm. FD (Fervojo): Heinz Schindler, fervoj-oficisto, Max-Klein-Str. 21; tel. (dumdeĵoro) 2460.

Solingen. VD & FD (Banko): Karl Sommer, em. bankrevizoro, D-565 Solingen 1, Hermannstr. 48; tel. 28.15.87.

Stuttgart. FD (Turismo): Johannes Windisch, kaldron-vartisto, D-7026 Bonlanden, Roggenstr. 39.

Hispanujo

Madrid. FD (Astronomio) & (Geografio): José Ma. Gonzalez Aboín, geografa inĝ., Marques de Urquijo 19 (distr. 8); tel. 248.67.56. FD (Elektrotekniko), (Fervojo) & (Radio/televido): Tomás Ortiz Garcia, fervojisto, C/. Fernando Poó 33-7º D. (buzon 40), Madrid (5); tel. 2173089. FD (Instruado): Raimundo Ibañez Crespo, instruisto, Princesa 78, Madrid-8; tel. 243-88-80. FD (Laboristaj aferoj): Francisco Ballesteros Rojo, dekoraciisto, Melendez Valdes. 56, distr. 15. FD (Muziko): Antonio Moya Casado, muzikdirektoro, str/. Infanta Mercedes 34, Madrid (20); tel. 2.33.90.86.

Villaneuva y Geltrú (Barcelona) 33 000. D: José M. Claramunt, katolika pastro, Colegio Samá, Escuelas Pías (Rambla Samá 154); tel. 293.01.25.

NE PLU VALIDAS (EN JARLIBRO 1966)

Brazilo. Belo Horizonte: FD (Filatelo).

Britujo. Doncaster. Witcombe.

Francujo. Aubière: D & FD.

Germanujo. Hamburg: FD (Kantado). Laute-recken. Leonberg: VD & FD.

Hispanujo: Cheste. Linares: D & FD. Madrid: FD (Ŝako), (Univ. aferoj). Manlleu: FD. Sabadell: FD (Dompentrado). Sama de Langreo. Valladolid: FD (Virinaj aferoj).

Italujo. Firenze: VD.

Nov-Zelando. Herald Is.: D & FD.

Svislando. Boudry: D & 3FD.

Soveta Unio. Leningrad: VD & FD.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Abuzzahab, d-ro Faruk S., Minneapolis, Usono.

Ciccanti, pastro Albino, Rimini, Italujo.

Cole, leŭt. John A., Albuquerque, Usono.

Murray, s-ino Mary, Portland, Usono.

Salasc, s-ro Joseph, Beziers, Francujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

112 Banham, s-ro F. R., Aŭstralio. 113 Araujo, f-ino I. Baggi de; 114 Dionísio, s-ro C. H.; 115 Domingues, d-ro C.; 116 Melo, s-ro Roskildes Per. de; 117 Nunes, s-ro Elmo Pereira; 118 Pádua, gen. Geraldo; 119 Rezende, d-ro C.; 120 Vaz, s-ro A. J., Brazilo. 121 Atkinson, s-ro Wilfrid G.; 122 Bowell, f-ino Barbara; 123 Cross, s-ino D.; 124 Hanson, s-ro C. G.; 125 Laurie, s-ro Edward Jackson; 126 Laurie, s-ino W.; 127 Middlemast, s-ro Arthur H.; 128 Murray, s-ro R.; 129 Paul, s-ro R.; 130 Phelan, s-ro H. K.; 131 Pilling, f-ino F.; 132 Prince, s-ro A.; 133 Relf, s-ro E. F.; 134 Ryan, s-ino Jane S.; 135 Sinclair, f-ino Patricia C.; 136 Sly, s-ro Kenneth A.; 137 Strangman, s-ro P. G.; 138 Williams, s-ro Norman; 139 Withey, s-ro D. H., Britujo. 140 Pedersen, s-ro J.; 141 Zacho, s-ino Birthe, Danlando. 142 Ihander, f-ino Olga Maria; 143 Korkala, s-ro Olavi, Finnlando. 144 Beau, s-ro Jean; 145 Dabezies, s-ro H.; 146 Llech-Walter, s-ro R.; 147 Peche, f-ino P.; 148 Yelland, s-ro E. E., Francujo. 149 Hilland, s-ro Jos., Germanujo. 150 Castellort Riba, s-ro Josep, Hispanujo. 151 Jerković, inĝ. B., Jugoslavio. 152 Archell, s-ro Reginald S.; 153 Clark, f-ino Mary A., Kanado. 154 Holleman, s-ro J. V.; 155 Kroon-Rentinck, s-ino J.; 156 Muller Jr., s-ro J. L., Nederlando. 157 Armanis, s-ro Andrejs; 158 Ringstad, s-ro G., Norvegujo. 159 Ahlström, f-ino M.; 160 Almen, s-ro P.; 161 Andersson, s-ro Bror; 162 Bosscher, f-ino A. I. H.; 163 Enström, f-ino M. L.; 164 Lidell, s-ro Ville; 165 Lind, f-ino E.; 166 Lindeberg, s-ino Britta; 167 Lundin, inĝ. Henry; 168 Möllestad, s-ro Sven; 169 Olsson, s-ro S.; 170 Persson, s-ro Olle; 171 Snarberg, s-ro Jack; 172 Stenström, f-ino Signe, Svedujo. 173 Grutter, s-ino L., Svisujo. 174 Doneis, s-ro A. F.; 175 Doneis, s-ino Mary; 176 d'Estries, s-ino M.; 177 Gerber, s-ro Wm.; 178 Oehler, s-ro René, Usono.

DONACOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

S-ro N.N., 130,—. Aŭstralio: Browne, s-ino A.G., 5,44. Britujo: Sly, s-ino S.V., 20,—; Williams, s-ro N., 1,90. Ĉeĥoslovakujo: Jakubcová, s-ino M., 4,—. Germanujo: Behrmann, s-ro H., 9,—; Bepperling, s-ro A., 5,40; Hilland, s-ro J., 7,83; Hollnagel, s-ro W., 5,40; Schinkel, s-ro R., 1,80. Kanado: Henderson, s-ino D. C., 3603,64; Philip, s-ro A., 8,30. Nov-Zelando: Bray, s-ro A. J., 7,50. Rumanujo: Lenkei, s-ro Josef, 1,60. Svedujo: Carlén, s-ro E., 40,05. Svisujo: Rehmann, s-ro A., 30,—.

FONDAJO CANUTO

Nederlando: Zeiler, s-ro F.: 1 MA.

DONACO POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Germanujo: Schmidt, s-ro G., 45,40 gld.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1967

A. (16,— gld.): 1. Parson, f-ino E. L., Britujo; 2. Peine, s-ro O., Germanujo; 3. Lewis, s-ro H. J., Kanado; 4. Umeda, s-ro Y., Japanujo; 5. Baaten, s-ro W.; 6. Moerbeek, s-ro R.; 7. Ruig, s-ro K., Nederlando.

B. (5,— gld.): 1. Dean, s-ro E. F., Britujo; 2. Gießner, s-ro J., Germanujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

stato je la 28-a de februaro

Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	(4) Britujo	6691	4325	64,64
2.	(1) Finnlando	3160	1930	61,08
3.	(8) Francujo	7752	4695	60,57
4.	(3) Nederlando	5975	3485	58,33
5.	(2) Usono	4526	2590	57,22
6.	Svedujo	7180	3715	51,74
7.	(5) Danlando	3099	1595	51,47
8.	(9) Hispanujo	3250	1580	48,62
9.	(7) Brazilo	3856	1486	38,54
10.	(13) Japanujo	3965	1480	37,33
11.	(10) Italujo	4220	1480	35,07
12.	(14) Svislando	2459	815	33,14
13.	(12) Germanujo	7221	2200	30,47
14.	(11) Jugoslavio	5375	1345	25,02
15.	Belgujo	2055	100	4,87

Konkurso II

1.	Kanado	1124	840	74,73
2.	(4) Islando	250	170	68,—
3.	Aŭstrujo	1475	765	51,86
4.	(2) Israelo	595	300	50,42
5.	(6) Sudafriko	260	100	38,46
6.	(8) Aŭstralio	1475	534	36,20
7.	Norvegujo	1755	590	33,62
8.	(5) Grekujo	270	90	33,33
9.	Madagaskaro	250	47	18,80
10.	Argentino	905	160	17,68
11.	Nov-Zelando	1481	175	11,82

ANONCETOJ

Ne-stampitajn poŝtmarkojn kaj unuatagajn hispanajn kovertojn, en kompletaj kaj sinsekvaj serioj ek de nun, mi deziras interŝanĝi kontraŭ samspeca filatela materialo el iu ajn lando. S-ro J. L. Vallés, Avenida José Antonio-423, Barcelona-15, Hispanujo.

Martinus-Instituto diskonigas inteligentece fundamentitan vivkoncepton por doni materialon por libera esplorado. Ĝi plene respektas aliajn vivkonceptojn kaj konsideras, ke neniu havas la rajton altrudi propran vivkoncepton al aliaj. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe la Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Atentu! Malfrue sed tutkore, mi deziras ĉion agrablan al amikoj kaj konatoj okaze novjaron. Samtempe informas ĉiujn, ke mi estas ĉiam atingebla pere de s-ro Seoti Prakash, B-15/10, Ramesh Nagar, New Delhi-15. Ne uzu alian adreson. Amikajn salutojn, M. Haudebine.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Anoj de Lions International, kiuj estas esperantistoj aŭ interesiĝas pri la Esperantomovado, priskribu vian vidpunkton pri fondo de "Esperanto-Grupo de Leonoj" por interŝanĝi ideojn per leteroj aŭ seeble renkontiĝi en Universala Kongreso aŭ Internacia Kunveno de Leonoj. Ni deziras kontakti amikojn—"Leonojn". Skribu al s-ro Nils Gösta Narvala, Majavatie 14 A 7, Helsinki 80, aŭ John Kailenta, 83 Kemball Ave., Staten Island, N.Y. 10314, Usono. Esperantistoj, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la Internacio de Leonoj bv. skribi por informoj.

Por sukcesi kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10%.

LAVESPA, kiu estas mondmovado al invalidoj kaj handikapuloj, deziras kontakti geamikojn de tuta mondo. Skribu al s-ro Manuel M. Heidun, Vestergade 53, Strib. Danlando.

Filatelistoj, kiuj sendos tri respondkuponojn al s-ro Flachsmeier, D-4005-Büderich, Neusserstr. 33, ricevos unutagkoverton special-afrankitan kun esperantlingva stampo DÜSSELDORF + ESPERANTO + FILATELO - 15.4.1967.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Amosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

Vegetara domo Erna Benhaim, Gordonstrato, Šĥunat Ovdim, Tiberias, Israelo por tranoktado, manĝado. Diverslingva biblioteko disponebla.

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

esperanto
aprilo 1967

La Esperantista Kulturdomo
 Kastelo Grésillon
 49 — BAUGE. Francujo
 Dum la tuta somero 1967a.
 Prezentas kompletan gamon de E. renkontoj.
 Dum la "INTERNACIAJ TURISMAJ
 kaj KULTURAJ FERIOJ"
 (23-an de Julio — 6-an de Aŭgusto)
 Prelegos: D-ro **ROOSE**:
 Modernaj instruado kaj pedagogio
 Modernaj vivkonceptoj kaj ilia efektiviĝo
 La Flandra Movado — Bruĝo
 S-ino **ROOSE**:
 ĝusta saniga nutrado
 Kiel atingi spiritan ekvilibron
 S-ino **CHEVERRY**: Anĵuo kaj ĝiaj riĉaĵoj
 S-ro **CHEVALIER**:
 Eminentaj medicinistoj en Loire-valo
 S-ro J. P. **GUILLOT**: Rabelais
 Samtempe okazos la **GRANDA RALIO** kun
 regionaj kaj lokaj provoj
 (petu la regularon)
 kaj diversaj gvidataj vizitoj:
 Tuttaga ekskurso en Loire-valo kaj -montetoj:
 "vojo de la vinoj"
 Tuttaga ekskurso al Le Mans
 Posttagmeza ekskurso al la Zoologia ĝardeno
 ĉiutage: matene: prelego (je la 9.30a)
 posttagmeze: konversacio (je la 18-a)
 vespere: parolado, ludoj, prezentado de filmo
 aŭ de kolorbildoj (je la 21-a)
 rapide aliĝu

DANTE ALIGHIERI :

La Dia Komedio

Serio Oriento-Okcidento, speciala eldono



Tradukis Giovanni Peterlongo

Ilustraĵoj de Botticelli

Paralelaj tekstoj itala kaj Esperanta
 Detala komentario

Prezo: 36,— gld. (144 st.)

Sola vendraĵo por la Esperanto-Movado:
 UEA

Oni skribis pri

KAŬKAZAJ RAKONTOJ

"Ĉi tiuj rakontoj estas ĝuo por la amatoroj de streĉaj aventuroj, sed ankaŭ de bela prozo, ĉar Lermontov, giganto de la rusa poezio, estas ankaŭ majstro de la prozo, kaj feliĉe la traduko de D. Staritsky estas ne nur fidela, sed ankaŭ vigla kaj bonstila."

Michel Duc-Goninaz en Heroldo

"Kvankam la rakonto estas strikta, dinamika kaj tute ne enuiga, oni bezonas trankvilan horon, se oni vere volas ĝui ĝin en ĉiuj nuancoj. Kaj tio, ŝajnas al mi, estas signo, ke temas pri 'klasikaĵo'."

Stefan Maul en Germana Esperanto-Revuo

"Turnante la lastan paĝon oni pensas bedaŭre: 'ha! jam finita!', kio estas laŭ mi la plej bona — kaj por esperantlingva verko malofta — komplemento."

G. L. en SAT-Amikaro

Prezo (kun alloga moderna bindaĵo): 5,— gld.

Ĉu vi serĉas revuon

kiu enhavas interesajn artikolojn pri

popularaj temoj,

kun grandformataj trafaj ilustraĵoj,

kiu vere "instruas kaj amuzas" ?

Do vi bezonas la monatan bildrevuon

LA PRAKTIKO

Eldonas : UEA

La administra maŝino de Universala Esperanto-Asocio kaj la redaktado de

Wilhelm Schmid garantias regulan, akuratan aperadon kaj aktualan enhavon.

Jarabono: 10,— gld. (40 steloj). Kotizoj per la ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA aŭ rekte al UEA, Rotterdam, poŝtkonto no. 378964.

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 23.-30. de julio en La internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.-21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

MODERNA ARĤITEKTURO

(en ligo kun la Internacia Jaro de Turismo)
estas la temo de la ĉi-jara

FOTO-KONKURSO DE UEA

Premioj: 100,—; 70,—; 40,— gld.

Sendu viajn nigra-blankajn konkurso-fotojn (min. formato 13 × 18 cm) al: 52a Universala Kongreso de Esperanto, POB 1289, Tel Aviv, por alveni antaŭ la 1-a de julio 1967.

KOLEKTU ANKORAŬ SUBSKRIBOJN

por la Propono

al U.N.!

Petu provizon da subskribfolioj de via landa
asocio aŭ rekte de UEA

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski



368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".


Prezo:

tuttolle bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA

LA NAŬZO

bind.
14,10 gld.
56,40 st.



222 p.
15 × 21

la obseda romano de

Jean-Paul Sartre

intimaj pensoj de neordinara menso
la unua okcidenta verko en la serio

ORIENTO-OKCIDENTO

NOVA DISKO !

Kantas:

Ramona van Dalsem

akompanas:

TOOS SCHOONMAN

La Feliĉo

kaj ses aliaj kantoj en esperanto

La plimulto de la tekstoj kaj melodioj estas verkitaj de la kantistino mem, kiu jam ricevis bonegan reputacion pro siaj ĉarmegaj, belsonaj kantoj.

Senriproĉa prononco
Klarega lingvo

Fleksebla, nerompebla, plasta materialo
Eldonis: U.E.A. Prezo: 2,50 gld., 10 steloj
Aldonu 10 % por sendkostoj

Mendu tuj ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtkonto 378964

JAROJ SUR TERO

memoroj de

Lakshmiswar Sinha

Rakonto pri infanjaroj en Hindujo, tiam ankoraŭ preskaŭ netuŝita de eŭropa kulturo, pri junaĝaj jaroj kaj kontakto kun Esperanto en norda Eŭropo kaj fine pri longa vivo en hejmlando iom post iom tute ŝanĝita.

126 p. Riĉe ilustrita. Bind. 11,50 gld; broŝ.
8,50 gld.

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo.
ELDONA SOCIETO ESPERANTO



ELDONIS "LA BONA SEMISTO" - MONTEVIDEO-1965

JEN VERKO NECESA POR NIA KONFUZA MONDO

DULINGVA LIBRO (HISPANE KAJ
ESPERANTE) HONORE AL U. N. -
ORGANIZO EN LA JARO DE
INTERNACIA KUNLABORO

Enhavo universale valora: Interesega — In-
strua — Eduka — Literatura — Agrabla —
Poezia kaj tre ilustrita

Unuigintaj Nacioj — Homaj rajtoj — Zamen-
hof, Paca Apostolo — Esperanto kaj Unesko
— Esperanto-kulturo — Esperanto-lernolibro
(por Hispanlingvanoj) — Poezia antologio His-
pana kaj Hispanamerika — kaj aliaj diversaj
temoj tre interesaj

Bindita volumo (cm. 20 × 15) 376 paĝoj,
presitaj sur bona papero, kaj ilustrita per 130
fotogravuroj

BONEGA LIBRO POR DONACO

Prezo: U\$S 4.00 afrankite

Mendoj al UEA, al diversaj libroservoj aŭ
rekte al "LA BONA SEMISTO"

Casilla de Correo 863

MONTEVIDEO (Urugvajo)